

LA ROMPITA KRUČO

KOMEDIO DE



HEINRICH VON KLEIST

Heinrich von Kleist
La rompita kruĉo
Komedio

Hungaria Esperanto-Asocio
Budapeŝto 2026

Originala titolo: Der zerbrochene Krug

Eldonis: Realschulbuchhandlung, 1811

Tradukis el la germana originalo: Jozefo Horvath

Eldonis: Hungaria Esperanto-Asocio

Titolpaĝo: Jozefo Horvath helpe de AI Gemini

ISBN 978-963-571-553-4

CC BY-NC-ND

Personoj

Walter: justica inspektisto

Adam: vilaĝestro

Licht: notario

S-ino Marthe Rull

Eve: ŝia filino

Veit Tümpel: kamparano

Ruprecht: lia filo

S-ino Brigitte

Servisto, provoso, servistinoj

Okazas en nederlanda vilaĝo ĉe Utrecht.

Unua sceno

Adam *sidas, bandaĝas sian piedon. Licht aperas.*

Licht: Ej, diablo kaj infero, diru, baptano Adam, kio okazis al vi? Kiel vi aspektas?

Adam: Vi ja spektas. Por stumbli necesas nenio, nur piedoj. Sur ĉi tiu plata tero sen tuberoj kaj ŝtoneroj. Ĉi tie mi stumblis, ja ĉiu portas en si la ĝenan ŝtonon de falpuŝiĝo.

Licht: Ĉu? Kion vi diras, amiko, ĉu ĉiu portas...?

Adam: Tiun ŝtonon, en si mem!

Licht: Damnite!

Adam: Kion vi bonvolas?

Licht: Vi originas de leĝermora ventkapulo, kiu stumblis ĉe la komenco de ĉio tera kaj famiĝis pro sia falo. Ĉu vi do estus...

Adam: Nu?

Licht: Ĉu same?

Adam: Ĉu mi?... Mi ja diras..., ĉi tie mi falis, en ĉi tiu loko.

Licht: Ĉu ne figurasence?

Adam: Ne ja, ne figurasence. Kaj la falo ne estis bela figuro.

Licht: Kiam ĝi okazis?

Adam: Ĵus, en la minuto, kiam mi ellitiĝis, por tiel diri, kun la kokinoj. La matena preĝo ankoraŭ ne forlasis mian langon, kiam mi stumblis, en plej frua mateno. Do antaŭ ol mi komencus la tagajn farendojn, la Di-Sinjoro subite eltordis mian piedon.

Licht: Kaj ĝuste la maldekstran, ĉu?

Adam: Ĉu la maldekstran?

Licht: Tiun, kiun vi etendis.

Adam: Ĉi tiun, kompreneble.

Licht: Nu ja, la maldekstran: kiu ankaŭ sen tio malfacile iras la vojon de

pekoj.

Adam: Ĉu la piedo? Kio? Ĉu malfacile? Kial?

Licht: Ĉu tia bulpiedo?

Adam: Bulpiedo! Unu piedo estas tiel bula kiel la alia.

Licht: Permesu objeti! Vi ne estas justa al la dekstra. La dekstra ne povas fanfaroni per tia bulo. Tial ĝi pli aŭdacas sur glitigaĵo.

Adam: Ba! Kie unu aŭdacas, tien sekvas ĝin la alia.

Licht: Kaj kio tiel tordis vian fizionomion?

Adam: Ĉu mian fizionomion?

Licht: Kial? Ĉu vi ne scias pri tio?

Adam: Mi mensogus... kiel ĝi do aspektas?

Licht: Kiel ĝi aspektas?

Adam: Jes, kara baptano.

Licht: Aĉe!

Adam: Parolu pli klare!

Licht: Kvazaŭ senhaŭtigita, teruras vidi ĝin. Peco mankas el la vango. Kiel granda? Sen pesilo mi ne taksus ĝin.

Adam: Mil diabloj!

Licht (*alportas spegulon*): Jen! Konvinkigu vi mem! Ŝafo, pelita tra dorna vepro, ne pagis per tiom da lano, ol kiom – Dio scias, kie – vi pagis per via karno.

Adam: Hm! Jes, vere. Aĉe ĝi aspektas. Kaj ankaŭ la nazo suferis.

Licht: Kaj unu okulo.

Adam: La okuloj ne, baptano.

Licht: Ej, jen kuŝas oblikve batspuro sangoŝmirita, Dio atestas, kvazaŭ bienservisto estus klabinta ĝin en sia kolero.

Adam: Ja vere, la okulosto, imagu, mi tute nenion sentis.

Licht: Jes, ĝuste! Kiel okazas en ardo de interbatiĝo.

Adam: Interbatiĝo? Kia interbatiĝo? Ho jes, kun tiu damnita virkapro mi interbatiĝis ĉe la forno, se vi volas scii. Nun mi jam memoras. Mi perdis la ekvilibron, kaj kiel ebria, mi kaptas por apogo en la aero, mi prenas la ŝnuron de la pantalono, kiun hieraŭ vespere mi pendigis por sekigi super la forno. Mi kaptas ĝin, imagu, mi malsaĝa pensas teni min per ĝi, la ŝnuro rompiĝas, kaj kune kun la ŝnuro kaj la pantalono mi falegas, kaj kapantaŭe batiĝas kontraŭ la fornon, ĝuste kiam la virkapro elŝovas sian muzelon ĉe la fornoangulo.

Licht (*ridas*) Bone, bone.

Adam: Damnite.

Licht: La unua falo de Adam, kiun vi faris el la lito.

Adam: Nu jen, nu jen!... Sed kion mi volis diri: kio nova?

Licht: Jes, kio nova! Damnite, preskaŭ mi forgesis diri.

Adam: Nu?

Licht: Preparu vin por neatendita vizito el Utrecht!

Adam: Ĉu?

Licht: La justica inspektisto venos.

Adam: Kiu venos?

Licht: S-ro justica inspektisto Walter venos el Utrecht. Li vojaĝas por kontroli instancojn, kaj ankoraŭ hodiaŭ li vizitos nin.

Adam: Ankoraŭ hodiaŭ! Ĉu via menso iris promeni?

Licht: Vere, kiel mi vivas. Li estis hieraŭ en Holla, la limvilaĝo. Tie li jam reviziis la juĝadon. Kamparano jam vidis, kiam oni jungis la ĉevalojn al Huisum.

Adam: La inspektisto venos ankoraŭ hodiaŭ el Utrecht! Por revizio, la brava homo, kiu mem senlanigas siajn ŝafetojn kaj persekutas la siaspecajn. Li venos al Huisum flaradi ĉi tie kaj rigardi en nian poton!

Licht: Se li venis ĝis Holla, li venos ankaŭ ĝis Huisum, do atentu!

Adam: Ba, lasu min!

Licht: Mi ja diras.

Adam: Kaj mi diras al vi, lasu min trankvila kun viaj fabeloj!

Licht: La kamparano vidis lin per la propraj okuloj, damnite!

Adam: Kiu scias, kiun la mukokula fripono vidis. Tiaj uloj ne diferencigas postaĵon de vizaĝo, se tiu estas kalva. Metu triangulan ĉapelon sur mian rotangon, pendigu mantelon ĉirkaŭe, du botojn sube, kaj la ulo rekonos en tio, kiun vi volas.

Licht: Nu bone, dubu ankaŭ plu, en la nomo de la diablo, ĝis li enpaŝos tra la pordo.

Adam: Li enpaŝos!... Ĉu sen ĵeti al ni antaŭe vorton?!

Licht: Kia malprudento! Kvazaŭ tiu estus la antaŭa inspektisto, tiu Wacholder! Nun inspektisto Walter revizios!

Adam: Nu, eĉ se inspektisto Walter! Ba, lasu min en paco! Tiu homo faris kaj praktikas ja sian ofican ĵuron, kiel ni, laŭ validaj dekretoj kaj kutimoj.

Licht: Nu, mi certigas vin, la inspektisto Walter neantaŭvideble aperis hieraŭ en Holla, reviziis la kason kaj aktojn kaj suspendis la lokajn vilaĝestron kaj notarion. Kial? Mi ne scias, *ab officio*¹.

Adam: Diablo prenu lin! Ĉu ankaŭ tion la kamparano rakontis?

Licht: Tion kaj ankoraŭ pli...

Adam: Ĉu?

Licht: Se vi volas scii. Ĉar hodiaŭ frumatene oni serĉis la vilaĝestron, prenitane en hejma aresto, kaj trovis lin balanciĝi de ŝnuro kortofine en la fojnejo, alte sur trabo.

Adam: Kion vi diras?

Licht: Rapide venis helpo, oni malligis lin, frotis kaj priŝprucis lin per akvo, revenigis lin en la nudan vivon.

Adam: Ĉu vere? Revenigis lin?

¹ Ab officio (latine): pr. oficiale, forte de sia ofico.

Licht: Kaj nun oni sigelas, ĵurigas kaj ŝlosas en lia domo. Li estas nun jam kvazaŭ mortinta, kaj ankaŭ lia ofico estas jam heredita.

Adam: Ej, mil diabloj!... Li estis facilanima kiel hundo. Cetere honesta knabo, vere, Dio atestas. Kompano agrabla, tamen terure malzorgema, tion mi devas diri. Se la justica inspektisto estis hodiaŭ en Holla, mi kredas, li trafis en peĉon, la kompatinda mizerulo.

Licht: Kaj ĉi tiu evento estas la sola kaŭzo, tiel rakontis la kamparano, ke la justica inspektisto ankoraŭ ne estas ĉi tie; sed ĝis tagmezo li neeviteble alvenos.

Adam: Ĝis tagmezo! Bone, baptano! Nun bezonatas amikeco. Vi scias, kiel du manoj lavas sin reciproke. Mi scias, vi volonte fariĝus vilaĝestro, kaj ne senmerite, je Dio, kiel ajnulo. Sed hodiaŭ ankoraŭ ne alvenis la okazo, hodiaŭ vi ankoraŭ lasu pasi la kalikon².

Licht: Ĉu vilaĝestro, mi? Kion misan vi pensas pri mi?

Adam: Vi estas homo de bone plektitaj vortoj. Kaj vi funde studis Ciceron, kiel ajnulo de la lernejo en Amsterdamo. Sed aŭdu, hodiaŭ subpremu vian elokventon! Ankoraŭ doniĝos okazo, kiam vi povos pruvi vian arton.

Licht: Ba, lasu tion! Ni estas ja baptanoj!

Adam: Siatempe, vi ja scias, ankaŭ la granda Demosteno³ silentis. Sekvu lian ekzemplon. Kvankam mi ne estas reĝo de Makedonio, tamen mi povus miamaniere esti dankema al vi.

Licht: Ŝparu al mi vian suspekton, mi diras al vi. Ĉu mi donis iam kaŭzon por tio...

Adam: Vidu, mi de mia flanko same sekvos la grandan grekon. Pri deponaĵoj kaj interezoj ja oni povus elcerbigi belajn periodojn, sed kiu volus tordi tiajn frazojn?

Licht: Nu, jen!

² Lasi pasi la kalikon: eviti eltrinki kalikon kun amaraĵo, ĉi tie temas pri ŝarĝa ofico.

³ Demosteno: helena oratoro kaj politikisto, kiam akuzita pri korupto, kun volvita gorgo li diris, ke li ne povas paroli.

Adam: De tiaj akuzoj mi estas libera, Dio atestas! Pri kio povas temi, estas nura bubaĵeto, naskito de la nokto, kiu timas la tro scivolajn lum-radiojn de la tago.

Licht: Mi konsentas.

Adam: Honorvorte, ne estas tia kaŭzo, ke juĝisto, se li ne sidas en sia ofica seĝo, konduitu tiel gravmiene kiel glaciurso.

Licht: Tion diras ankaŭ mi.

Adam: Nu do, venu, baptano, sekvu min por tempeto en la arĥivon! Mi aranĝos la aktostokojn, ĉar ili diskuŝas kiel la Babela turo.

Dua sceno

***Servisto** enpaŝas. La antaŭaj. Pli malfrue du servistinoj*

Servisto: Benitan tagon, s-ro vilaĝestro! La justica inspektisto Walter sendas min kun sia saluto, baldaŭ ankaŭ li mem estos ĉi tie.

Adam: Ej ha, alta ĉielo! Ĉu li estas jam preta kun Holla?

Servisto: Jes, li jam estas en Huisum.

Adam: He! Liese! Grete!

Licht: Trankvile, nun trankvile!

Adam: Kara mia baptano!

Licht: Anoncu vian dankon al li!

Servisto: Kaj morgaŭ ni veturos al Hussahe.

Adam: Kaj nun kion mi faru, kion mi lasu? (*Volas preni siajn vestaĵojn.*)

Unua servistino (*enpaŝas*): Jen mi estas, s-ro vilaĝestro.

Licht: Ĉu vi volas surmeti pantalonon? Ĉu vi frenezigiĝis?

Dua servistino (*enpaŝas*): Jen mi estas, s-ro vilaĝestro.

Licht: Prenu la palton!

Adam (*ĉirkaŭrigardas*): Kiu? Ĉu la inspektisto?

Licht: Ba, la servistino.

Adam: Koltukon! Mantelon! Kolumon!

Unua servistino: Unue la veŝton!

Adam: Kio? Rapide la palton? Urĝu vin!

Licht (*al la servisto*): La s-ro justica inspektisto estas bonvena ĉe ni. Ni baldaŭ estos pretaj por akcepti lin. Diru tion al li!

Adam: Pro diablo! Vilaĝestro Adam petas pardonon.

Licht: Pardonon?!

Adam: Pardonon. Ĉu li jam estas survoje?

Servisto: Ankoraŭ en la gastejo. Li vokigis al si la forĝiston, la kabrio-
leto rompiĝis.

Adam: Bone. Lia humila servisto. La forĝisto estas pigra. Mi devas sen-
kulpigi min. Mi preskaŭ rompis la kolon kaj la piedojn, rigardu vi mem,
estas skandale, kiel mi aspektas; kaj ĉiu ektimo laksigas min laŭnature.
Mi kredas, ke mi malsanas.

Licht: Ĉu paneas via menso? La s-ro inspektisto estos bonvena gasto...
Kion vi volas?

Adam: Volas la diablo!

Licht: Kion?

Adam: Ke la diablo min prenu, tiel ne estas bone, kvazaŭ mi jam estus
glutinta la pulvoron!

Licht: Mankas nur, ke vi marku la vojon.

Adam: Grete, he! Sako da ostoj! Liese!

Ambaŭ servistinoj: Ni ja estas ĉi tie? Kion vi deziras?

Adam: Ek rapide! Ŝinkon, buteron, kolbason, botelojn tuj forigu el la
arĥivo! Kaj vige! Vi ne. La alia. Vi, gapabuŝa! Vi, jes! Ke fulmo karesu
vin, Grete! Liese, la bovistino iru en la arĥivon!

Unua servistino (*iras for.*)

Dua servistino: Parolu tiel, ke ni komprenu vin!

Adam: Fermu vian bekon, mi diras! For, alportu mian perukon! Ek, he,

ek! El la libroŝranko! Rapide! Malaperigu vin! (*La dua servistino eliras.*)

Licht (*al la servisto*): Mi esperas, ke nenio malbona trafis la inspektistan moŝton dum la vojo.

Servisto: Ne vere, ni nur renversigis en la ravino.

Adam: Damnite! Mia frotvundita piedo! Mi ne povas surtiri la boton...

Licht: Ho, Dio mizerikorda! Vi renversigis, ĉu vi diras? Espereble okazis nenio malbona?

Servisto: Nenio grava. La sinjoro iom tordis la manon. La timono rompiĝis.

Adam: Prefere lia nuko rompiĝus!

Licht: La mano tordita! Ho, Dio mia! Ĉu la forĝisto jam alvenis?

Servisto: Jes, por la timono.

Licht: Kiel vi diras?

Adam: Vi opinias, la doktoro.

Licht: Kion vi diras?

Servisto: Por la timono, ĉu?

Adam: Ba ne! Por la mano.

Servisto: Adiaŭ, sinjoroj. (*flanke*) Mi kredas, la uloj estas frenezaj. (*for*)

Licht: Mi volis diri, la forĝisto.

Adam: Vi malkaŝas vin, baptano.

Licht: Ĉu? Kiel?

Adam: Vi estas konfuzita.

Licht: Ĉu mi?

Adam: (*Enpaŝas la unua servistino.*) He, Liese! Kio estas en via mano?

Unua servistino: Kolbaso el Braunschweig, s-ro vilaĝestro.

Adam: Mi parolas pri la kuratora akto.

Licht: Ĉu mi konfuzita?!

Adam: Reportu ĝin en la arĥivon.

Unua servistino: Ĉu la kolbason?

Adam: Ba, kian kolbason?! La akton, en kiu ĝi estas envolvita.

Licht: Tio estis miskompreno.

Dua servistino (*enpaŝas*): S-ro vilaĝestro, mi ne trovas la perukon en la libroŝranko.

Adam: Kial ne?

Dua servistino: Hm! Ĉar vi...

Adam: Nu?

Dua servistino: Hieraŭ vespere... Ĉe la bato de la dek-unua horo...

Adam: Nu, ĉu vi fine elpepos?

Dua servistino: Ej, vi revenis hejmen, rememoru, sen via peruko.

Adam: Ĉu mi, sen peruko?

Dua servistino: Jes, vere ja. Jen Liese, ŝi povas atesti. Kaj la alia estas ĉe la perukisto.

Adam: Ĉu mi estus?...

Unua servistino: Jes, honorvorte, s-ro vilaĝestro! Vi revenis nudkapa, vi diris, ke vi falis, ĉu vi ne memoras? Mi devis ja forviŝi la sangon de via kapo.

Adam: Vi, senhonta!

Unua servistino: Mi ne vidu la taglumon, se mi...

Adam: Fermu vian bekon, eĉ unu via vorto ne veras.

Licht: Ĉu vi ricevis la vundon jam hieraŭ?

Adam: Ne, hodiaŭ. La vundo hodiaŭ kaj la peruko hieraŭ. Mi havis ĝin pudritan sur la kapo, kaj mi deprenis ĝin hazarde kune kun la ĉapelo, honorvorte, nur kiam mi paŝis en la domon. Kion ŝi lavis, pri tio mi scias nenion. Forbalau vin en la inferon, kien vi apartenas! Iru en la arĥivon! (*Unua servistino for.*) Iru, Grete, al la sakristiano, li pruntos la sian. En la mian la katino hodiaŭ matene naskis, la porkino! Ĝi kuŝas

malpurigita sub la lito, mi jam memoras.

Licht: Ĉu la katino? Kio? Ĉu vi perdis la pru...

Adam: Vere, kiel mi vivas. Kvin idoj, flavaj kaj nigraj kaj unu blanka. La nigrajn mi dronigos en Vecht. Kion mi povus fari? Ĉu vi volas unu?

Licht: Ĉu en la perukon?

Adam: Diablo prenu min! Mi pendigis la perukon sur la seĝon, kiam mi enlitigis, nokte mi puŝis la seĝon, la peruko falis...

Licht: Kaj tiam la katino kaptis ĝin en la buŝon...

Adam: Honorvorte...

Licht: ...kaj portis ĝin sub la liton kaj akuŝis en ĝi.

Adam: Ĉu en la buŝon? Ne...

Licht: Ĉu ne? Kiel do?

Adam: Ĉu la katino? Ba, kion vi diras!

Licht: Ĉu ne? Aŭ ĉu eble vi?...

Adam: ...prenis en la buŝon? Mi kredas, hodiaŭ mi puŝis ĝin sub la liton per la piedo, kiam mi vidis...

Licht: Bone, bone.

Adam: La senhontuloj! Ili petolaĉas kaj akuŝas, kien ili ĝuste trafas.

Dua servistino (hihias): Ĉu mi do iru?

Adam: Jes, kaj mian saluton al avino Schwarzgewand, la sakristiana edzino. Mi ankoraŭ hodiaŭ resendos al ŝi la perukon sendifektan, al li vi bezonas diri nenion. Ĉu komprenite?

Dua servistino: Mi aranĝos ĉion, ne zorgu! (*for*)

Tria sceno

Adam kaj Licht

Adam: Mi havas hodiaŭ malbonan antaŭsenton, baptano Licht.

Licht: Kial?

Adam: Ĉio iras inverse-renverse. Krome, ĉu ne estas hodiaŭ juĝotago?

Licht: Certe. La plendantoj jam staras antaŭ la pordo.

Adam: Mi songis, ke pledanto kaptis kaj trenis min antaŭ la juĝistan seĝon, en kiu mi mem sidis kaj skoldis, insultis, superŝutis min per ĉiuj akuzoj kaj kondamnis min sidi en fero.

Licht: Kiel? Ĉu vin mem?

Adam: Tiel vere, kiel mi estas honesta. Poste ni ambaŭ fariĝis unu kaj fuĝis kaj ni devis tranokti en picearo.

Licht: Nu, kia songo... ĉu vi opinias?...

Adam: La diablo prenu la songon! Estu kiel ajn, sed eĉ, se ĝi ne estas vero, petola diablo ludas kun mi!

Licht: Senkaŭza timo! Procedu nur laŭ la preskriboj kontraŭ ambaŭ flankoj en via juĝista seĝo, kiam la inspektisto ĉeestos, tiel la songo pri la mistraktita juĝisto neniel plenumiĝos.

Kvara sceno

La antaŭaj. La justica inspektisto Walter enpaŝas.

Walter: Di-benitan tagon, vilaĝestro Adam.

Adam: Ho, bonvenon! Bonvenon, altmoŝta sinjoro en nia Huisum! Kiu povus, Dio mia, kiu povus kalkuli kun tia ĝojiga vizito. Ankoraŭ frumatene, antaŭ la oka sonorilbato oni eĉ en songo ne povis esperi tian fortunon.

Walter: Mi venas iom neatendite, mi scias; kaj mi estas kontenta dum mia vojaĝo en la servo de niaj ŝtatoj, se miaj gastigantoj lasas min foriri kun sincera adiaŭa saluto. Kio koncernas mian saluton, ĝi venas

el la koro jam ĉe mia alveno. La supera tribunalo en Utrecht intencas plibonigi en la ebenaĵo la jurisdikcion, kiu ŝajnas mankhava kelkloke, kaj misuzoj povas atendi rigoran prijuĝon. Sed mia tasko dum ĉi tiu inspekta vojaĝo ankoraŭ ne estas severa, mi devas nur vidi, ne puni. Kaj se mi trovas ion ne en la deva ordo, mi ĝojas, se tio estas tolerebla.

Adam: Vere, tio estas nobla pensmaniero, laŭdinda. Mi ne dubas, via moŝto certe scipovos riproĉi ion kaj tion en la malnova juĝpraktiko, eĉ se ĝi jam de imperiestro Karolo la 5a validas en Nederlando: kion la homa menso ja ne povus elpensi? La mondo, kiel la proverbo diras, fariĝas ĉiam pli saĝa, kaj mi scias. nuntempe jam ĉiuj legas la verkojn de Puffendorf. Tamen Huisum estas eta parto de la mondo kaj povas posedi ne pli kaj ne malpli, nur sian negrandan parton el la ĝenerala saĝo. Orientu tial la justicon de Huisum kaj vi konvinkiĝos, altmoŝta sinjoro, ke vi ankoraŭ ne turnos al ĝi la dorson, ĝi jam kontentige funkcias. Tamen se vi trovos ĉion en via ofico, kiel vi deziras, je mia animo mi diras, tio estus vera miraklo, ĝi ja ankoraŭ nur nebule scias, kion vi volas.

Walter: Mankas preskriboj, ja prave. Aŭ pli ĝuste, da ili estas tro multaj, oni devus kribri ilin .

Adam: Jes, tra granda kribrilo. Restas tro da ventumaĵo.

Walter: Tie mi vidas la s-ron notario, ĉu?

Licht: Notario Licht por la servo de via moŝto. Pentekoste mi estos la naŭan jaron en la justico.

Adam (*alportas seĝon*): Bonvolu sidiĝi.

Walter: Ba, lasu!

Adam: Vi venas de Holla.

Walter: Du mallongaj mejloj. De kie vi scias?

Adam: De kie? La servisto de via moŝto...

Licht: Kamparano diris tion, kiu ĵus alvenis de Holla.

Walter: Ĉu kamparano?

Adam: Je via servo.

Walter: Jes. Malagrabla evento okazis tie, kiu ĝenis mian serenon humoron, kiu devas akompani nin, kiam ni procedas oficiale. Vi estas do informitaj pri ĝi, ĉu?

Adam: Ĉu estas vere, atestimata sinjoro? La vilaĝestro Pfaul, ĉar arestita en sia domo, en sia malespero, la malsaĝa pendigis sin?

Walter: Kion li nur pligravigis per ĉi tiu ago. Ĉar kio ŝajnis nur malordo, neglekto, nun alprenis la ŝajnon de malversacio, kiun la leĝo, kiel vi scias, jam ne lasas nepunita. Kiom da kasoj vi havas?

Adam: Kvin, je via servo.

Walter: Kial kvin? Mi estis en eraro. Ĉu plenaj kasoj? Mi estis en eraro, kredante ke nur kvar...

Adam: Pardonu! Kune kun la kaso de kolektoj pro la inundo de Rejno.

Walter: Ĉu kaso de kolektoj pro la inundo? Sed nun Rejno ja ne inundis, do la kolektoj ne povis enflui. Diru, ĉu vi nun havas juĝotagon?

Adam: Ĉu ni?...

Walter: Kiel?

Licht: Jes, la unuan en la semajno.

Walter:

Kaj la amaso de la homoj, kiujn mi vidis ekstere en la galerio, ĉu ili estas...

Adam: Ho, ili nur...

Licht: ...estas la plendantoj, kiuj jam kolektiĝas.

Walter: Bone. Mi alvenis ĝustatempe, sinjoroj. Enlasu do la homojn, se vi tiel deziras. Mi ĉeestos la juĝadon, mi vidos, kiel ĝi praktikiĝas en via Huisum. Ni okupiĝos pri la administrado, la financoj poste, se ĉi tiu afero estos finita.

Adam: Kiel vi ordonas. Provoso! He, Hanfriede!

Kvina sceno

La antaŭaj. La dua servistino enpaŝas.

Dua servistino: La sakristiana edzino igas vin saluti, vilaĝestra moŝto Adam. Kiel ajn volonte ŝi pruntus al vi la perukon...

Adam: Kiel? Ĉu ne?

Dua servistino: Ŝi diras, hodiaŭ estos matena prediko, unu surhavo la sakristiano, kaj la alia iĝis neuzebla, hodiaŭ oni portos ĝin al la perukisto.

Adam: Damnite!

Dua servistino: Apenaŭ la sakristiano finos, ŝi tuj sendos la lian al vi.

Adam: Je mia honoro, inspektista moŝto...

Walter: Kio okazis?

Adam: Hazardo, damnita hazardo senigis min je miaj du perukoj. Kaj nun mi ne havas ankaŭ la trian, kiun mi volis prunti. Mi devos teni la juĝotagon nudkapa.

Walter: Ĉu nudkapa?

Adam: Jes, Dio mizerikorda! Sen la peruko mi timas malhavi la necesan aŭtoritaton. Eble mi povus provi en la farmo. Se la farmisto havus...

Walter: En la farmo?! Ĉu neniuj aliaj havas perukon ĉi-loke?

Adam: Neniu, fakte...

Walter: Eble la pastoro.

Adam: Ĉu la pastoro? Li...

Walter: Aŭ la instrumajstro.

Adam: De kiam la dekonaĵo estas abolita, via moŝto, en kiu mi en mia ofico aktive kunagis, mi ne povas kalkuli je iliaj servoj.

Walter: Nu, do, s-ro vilaĝestro? Kion fari? Kio pri la juĝotago? Ĉu vi volas atendi, ĝis viaj haroj kreskos?

Adam: Se vi permesas, mi sendos iun al la farmo.

Walter: Kiom for estas la farmo?

Adam: Nur je mallonga duonhoreto.

Walter: Duonhoro?! Kio? Kaj via kunsido jam devus komenciĝi. Faru disponojn! Ankoraŭ hodiaŭ mi devas esti en Hussahe.

Adam: Disponi, estas facile diri...

Walter: Ej, do pudru vian kapon! Kie en la infero vi lasis viajn perukojn? Elturniĝu, kiel vi povas. Al mi estas urĝe.

Adam: Nur tio mankis al mi!

Provoso (*enpaŝas*): Jen la provoso!

Adam: Ĉu mi povas servi dume per bona matenmanĝo, kolbasoj el Braunschweig, glaseto da brando eble...

Walter: Mi tre dankas.

Adam: Sen ceremonioj!

Walter: Dankon, vi aŭdis, mi jam manĝis. Iru, profitu la tempon, mi bezonas fari kelkajn notojn en mia libreto.

Adam: Jes, se vi tiel ordonas... Venu, Grete!

Walter: Vi estas ja aĉe vundita, s-ro vilaĝestro Adam. Ĉu vi falis?

Adam: Mi ricevis veran mortobaton. Hodiaŭ frumatene, kiam mi ellitiĝis, vidu, via moŝto, mi estis kvazaŭ ruinigita meze de mia ĉambro, falante mi kredis trafi en mian tombon.

Walter: Mi tre bedaŭras. Tio ne havos pliajn sekvojn, ĉu?

Adam: Mi kredas, ke ne. Mi ne estos malhelpata en la plenumo de miaj devoj. Se vi permesas...

Walter: Iru do, iru!

Adam (*al la provoso*): Voku la plendantojn, marŝ! (*Adam, la servistino kaj la provoso foriras.*)

Sesa sceno

S-ino Marthe, Eve, Veit kaj Ruprecht enpaŝas. Walter kaj Licht fone.

S-ino Marthe: Vi kruĉorompa bandaĉo, vi! Vi devos nun puniĝi!

Veit: Estu trankvila, s-ino Marthe! Nun oni kunvenis por decidi.

S-ino Marthe: Ho jes, decidi. Aŭdu la ĉiosciulon! Decidi pri la kruĉo, kion decidi, ĉu ke mi devas de-cedi de mia kruĉo?! Oni decidis ĉi tie, ke la kruĉo restu rompita. Kia decido ĝi estas?! Eĉ pecon de mia rompita kruĉo mi ne donus por tia decido!

Veit: Se vi pruvigoj prava, mi restarigos la pli fruan staton.

S-ino Marthe: Li restarigos la pli fruan staton! Se mi pruvigoj prava, restarigu do la kruĉon, kie ĝis nun ĝi staris, sur la fenestrobreton. Restarigi kruĉon, kiu havas nek fundon por stari, nek flankon por kuŝi, ba, kiel vi restarigos ĝin?!

Veit: Aŭdu, he! Kial vi bolas kaj ŝaŭmas. Ĉu oni povas fari pli? Se iu el ni rompis la kruĉon, vi estos sendamaĝigita.

S-ino Marthe: Mi, sendamaĝigita! Kvazaŭ unu el miaj brutoj parolus. Ĉu vi opinias, ke la justico estas potisto? La altmoŝtaj sinjoroj ligos al si antaŭtukon kaj metos mian kruĉon en la fornon. Prefere en la kruĉon ili metus ion al mi ol ĝin fari sendamaĝa.

Ruprecht: Lasu ŝin, patra moŝto! Venu kun mi! La megeron konsumas ne la rompita kruĉo, sed nia rompita nupto. Kaj nun perforte ŝi volas fliki ĝin. Sed mi havas medolon en la ostoj, damnita mi estus, se mi edzinigus la putinon.

S-ino Marthe: La aroganta krudulo. Ĉu mi fliki la nupton?! Nupton, kiu eĉ nerompita valoris eĉ ne la flikdraton, nek unu pecon de la rompita kruĉo. Kaj se ĉi tiu nupto starus antaŭ mi bele kompleta kaj briligita, kiel ankoraŭ hieraŭ mia kruĉo staris sur la fenestrobreto, mi kaptus ĝian anson per ambaŭ manoj kaj frakasus ĝin brue en pecojn sur lia kapo. Multe malpli ol fliki ĝiajn pecojn. Ĉu mi, fliki?

Eve: Ruprecht!

Ruprecht: For de mi vi...!

Eve: Karega Ruprecht mia!

Ruprecht: Malaperu el mia vido!

Eve: Mi petegas vin.

Ruprecht: Vi senhonta! Mi ne povas eldiri, kio via estas.

Eve: Lasu min diri al vi sekrete kelkajn...

Ruprecht: Eĉ vorton ne!

Eve: Vi aliĝos nun al la regimento, ho, Ruprecht. Se vi portos muskendon, kiu scias, ĉu mi revidos vin iam en la vivo. Milito nun iras, pripensu, milito, en kiun vi iros: ĉu vi volas disiĝi de mi kun rankoro en via koro?

Ruprecht: Ĉu rankoro? Ne, Dio gardu min, tion mi ne volas. Dio donacu al vi tiom da bonoj, kiom Li nur povas malhavi. Tamen eĉ se mi revenos el la milito sana kaj fortika kaj ĝisvivos mian okdekan jaron en Huisum, mi diros al vi egale antaŭ mia morto: putino! Vi ja mem ĵuros pri tio antaŭ la tribunalo!

S-ino Marthe (*al Eve*): For de ĉi tie! Kion mi diris al vi? Ĉu vi lasus vin insulti? La s-ro kaporalo, jes ja, tiu meritplena lignokrurulo indas je vi, kiu en la armeo tenis bastonon, malkiel ĉi tiu gapabuŝulo, kiu baldaŭ klinos la dorson sub bastonon. Hodiaŭ estos fianĉiniĝo, geedziĝo, estus ankaŭ baptado, ĝi plaĉus al mi, kaj mi tolerus ankaŭ mian sepulton, se per ĝi unue mi rompus la kornojn al ĉi tiu orgojla nululo, kiu aŭdacis tuŝi miajn kruĉojn.

Eve: Patrino! Lasu tiun kruĉon! Mi provos trovi en la urbo lertan metiiston, kiu regluos la pecojn por via kontento. Kaj se li ne povus, forprenu mian tutan ŝparujon kaj aĉetu al vi novan. Kiu volus fari tian bruon kaj kaŭzi tian malfeliĉon pro sola kruĉo, eĉ se ĝi estus el la tempo de Herodo.

S-ino Marthe: Vi parolas, kiom vi valoras. Ĉu vi volas stariĝi antaŭ pilorio, Enjo, pentofari sekvadimanĉe en la preĝejo? Via bona famo kuŝis en ĉi tiu kruĉo, kiu estas kune kun ĝi frakasita por la mondo, eĉ

se ne antaŭ Dio kaj antaŭ mi kaj vi. La justico estas mia metiisto, ekzekutisto, punbenko kaj bastonbatoj nun bezonatas, kaj ĵeti sur brulŝtiparon la tutan plebaĉon, por purbruligi nian bonfamon kaj reglazuri ĉi tiun kruĉon.

Sepa sceno

La antaŭaj. Adam envenas en ornato, tamen sen peruko.

Adam (*al si*): Ho, Enjo! Kaj tiu kruda bubo Ruprecht! Ha, damnite! La tuta klano estas ĉi tie! Ĉu ili ja ne volas akuzi min al mi mem?!

Eve: Ho, kara patrino, sekvu min, mi petegas vin, ni fuĝu el ĉi tiu damnita ĉambro!

Adam: Baptano, diru al mi, kion tiuj alportas?

Licht: Kiel mi scius? Bruo por nenio, negravaĵoj. Rompiĝis kruĉo, kiel mi aŭdis.

Adam: Kruĉo! Ĉu? Ej, ej, kiu rompis ĝin?

Licht: Kiu rompis ĝin?

Adam: Jes, baptanjo.

Licht: Ba, sidiĝu kaj vi ekscios.

Adam (*kaŝe*): Enjo!

Eve (*same*): Lasu min!

Adam: Por vorto.

Eve: Mi volas aŭdi nenion.

Adam: Kial vi venis?

Eve: Mi diris, lasu min!

Adam: Enjo! Mi petas vin! Kion vi volas de mi?

Eve: Se vi ne tuj... Mi diros al vi, sed nun lasu min!

Adam (*al Licht*): Baptano, aŭdu, je honorvorto, mi ne eltenos tion. La vundo sur la tibio kaŭzas al mi misfarton. Gvidu vi la proceson, mi prefere kuŝiĝus en liton.

Licht: Ĉu en liton? Ĉu vi volas en liton? Ŝajnas al mi, ke vi freneziĝis.

Adam: Diablo prenu! Mi devas vomi.

Licht: Mi kredas, ke vi deliras, serioze. Vi ja ĵus alvenis. Nu, pro mi... Anoncu tion al la justica inspektisto. Eble li permesos. Mi ne scias propre, kio al vi mankas.

Adam (*ree al Eve*): Enjo! Mi petegas vin! Je la kvin vundoj de Kristo! Kio alvenigis vin?

Eve: Vi baldaŭ aŭdos.

Adam: Ĉu la kruĉo estas la sama, kiun via patrino tenas, kiun mi, por tiel diri...

Eve: Jes, nur la rompaĵoj de la kruĉo.

Adam: Ĉu nenio cetera?

Eve: Nenio cetera.

Adam: Ĉu nenio? Ĉu certe?

Eve: Mi ja diras! Foriru, lasu min en paco!

Adam: Aŭdu, he, pro amo al Dio, estu saĝa, mi konsilas al vi!

Eve: Ho, vi senhonta!

Adam: En la atesto staras nun la nomo Ruprecht Tümpel, per belaj gotikaj literoj. Mi portas ĝin netigitan en la poŝo; ĉu vi aŭdas, kiel ĝi kraketas, Enjo? Hodiaŭ post jaro, je honorvorto, vi povos veni por ĝi, tajli al vi funebrajn antaŭtukon kaj korsaĵon, kiam vi aŭdos, ke Ruprecht elblovis sian animon en Batavio, mi ne scias, pro kiu febro, ĉu flava, skarlata aŭ putriga.

Walter: Antaŭ la kunsido ne parolu kun la partioj, s-ro vilaĝestro Adam! Sidiĝu ĉi tie kaj pridemandu ilin!

Adam: Kion li diras?... Kion via moŝto bonvolas ordoni?

Walter: Kion mi ordonas? Mi diris al vi kompreneble, ke antaŭ la kunsido vi ne devas fari dubsencajn paroladojn kun la partioj. Jen la loko, kiu apartenas al via ofico, kaj estas publika priaŭskulto, kiun mi atendas de vi.

Adamo (*al si*): Damnite! Mi ne povas konstati! Io krakis, kiam mi adiaŭis...

Licht (*alarminte lin*): S-ro vilaĝestro! Ĉu vi eble...

Adam: Ĉu mi? Honorvorte ne! Mi estis ĝin singarde pendiginta, kaj devus esti bovo...

Licht: Kio?

Adam: Kion vi diras?

Licht: Mi demandis...

Adam: Vi demandis, ĉu mi...

Licht: Ĉu vi surdiĝis, mi volis demandi. La altmoŝta inspektisto vokas vin.

Adam: Mi kredis... Kiu vokas?

Licht: La inspektista moŝto tie.

Adam (*al si*): Ej, karesu lin la ekzekutisto! Du ebloj restis, damnite, ne pli, ĉu fleksiĝi aŭ rompiĝi... Tuj! Tuj! Tuj! Kion via moŝto ordonas? Ĉu mi komencu la proceduron?

Walter: Vi estas nekutime distrita. Kio trafis vin?

Adam: Ho, pardonu min! Mia numido, kiun mi aĉetis ĉe vojaĝinto en Hindio, estas trafita de pipso. Mi devus ŝtopnutri ĝin, sed mi ne kompetentas prie. Mi estas ŝtipkapulo pri tiaj aferoj, tial mi petis konsilon ĉe tiu pucelo. Vi scias, miaj kortobirdoj estas kvazaŭ miaj infanoj.

Walter: Sidiĝu nun! Voku la plendanton kaj pridemandu lin! Kaj vi, s-ro notario, faru la protokolon!

Adam: Ĉu via altmoŝta sinjoro ordonas gvidi la proceson laŭ ĉiuj formalajoj, aŭ tiel, kiel en Huisum estas kutime.

Walter: Laŭ la leĝaj formalajoj, kiel en Huisum estas kutime, ne alimaniere.

Adam: Bone, bone. Kiel vi bonvolas ordoni. Ĉu vi pretas, s-ro notario?

Licht: Je via servo.

Adam: Do la justico iru sian vojon! Plendanto, paŝu antaŭen!

S-ino Marthe: Jen mi, s-ro vilaĝestro!

Adam: Kiu vi estas?

S-ino Marthe: Ĉu mi?

Adam: Jes, vi.

S-ino Marthe: Kiu mi estus?

Adam: Kiu vi estas? Viaj nomo, statuso, loĝloko kaj tiel plu.

S-ino Marthe: Mi kredas, vi ŝercas, s-ro vilaĝestro.

Adam: Ĉu ŝerci, mi? Mi sidas ĉi tie en la nomo de la justico, s-ino Marthe, kaj la justico bezonas scii, kiu vi estas.

Licht (*subvoĉe*): Ne insistu pri ĉi tiuj sensencaj demandoj!

S-ino Marthe: Vi ja ĉiudimanĉe enrigardas tra miaj fenestroj, kiam vi iras al la farmo.

Walter: Ĉu vi konas la virinon?

Adam: Ŝi loĝas proksime ĉe la stratangulo, altmoŝta sinjoro, se oni iras sur la pado tra la heĝo. Vidvino de la kastelservisto, nun akuŝistino, cetere honesta, bonfama virino.

Walter: Se vi estas tiel bone informita, s-ro vilaĝestro, tiaj demandoj estas superflujaj. Enskribigu ŝian nomon en la protokolon kun la rimarko: „bone konata al la ofico”.

Adam: Ho jes. Vi ne ŝatas formalajojn. Faru, kiel lia moŝto ordonas!

Walter: Nun demandu pri la objekto de la plendo!

Adam: Ĉu nun mi devas...

Walter: Jes, ekscii la objekton.

Adam: Ĝi estas same kruĉo, pardonu min!

Walter: Kio? Kiel same?

Adam: Kruĉo. Nura kruĉo. Skribu „kruĉo” kun la rimarko „bone konata al la ofico”.

Licht: Kiel, s-ro vilaĝestro, ĉu surbaze de mia dirita supozo...

Adam: Ba, se mi diras al vi, skribu do. Ĉu ĝi ne estas kruĉo, s-ino Marthe?

S-ino Marthe: Jes, vere kruĉo romp...

Adam: Nu vidu! Kruĉo.

S-ino Marthe: Rompita.

Adam: Ba, pedanta harfendado.

Licht: Mi petas vin...

Adam: Kaj kiu rompis la kruĉon? Certe tiu fripono...

S-ino Marthe: Jes, li, tiu sentaŭgulo...

Adam (*al si*): Pli mi ja ne bezonas.

Ruprecht: Tio ne veras, s-ro vilaĝestro.

Adam (*al si*): Atenton! Atentu, maljuna Adam!

Ruprecht: Ŝi mensogas senhonte.

Adam: Silentu, gapabuŝulo! Vi tro frue ŝovas vian kolon en la feron. Skribu, s-ro notario, kruĉo, kiel dirite kun la nomo de tiu, kiu rompis ĝin. La afero baldaŭ tute klariĝos.

Walter: Ej, kiel truda proceduro, s-ro vilaĝestro!

Adam: Kial do?

Licht: Ĉu vi ne volas laŭ la formalajoj...

Adam: Ne! Mi ja diras. Lia altmoŝta sinjoro ne ŝatas formalajojn.

Walter: Se vi ne scipovas gvidi la proceson laŭ la instrukcioj, s-ro vilaĝestro, ne estas nun tempo, nek ĉi tie loko instrui ilin al vi. Se vi ne scipovas validigi la juston alimaniere, cedu vian lokon, eble via notario scipovas.

Adam: Pardonu! Mi validigis ĝin, kiel en Huisum estas kutime, ja via moŝto ordonis al mi tion.

Walter: Ĉu mi estus...

Adam: Je mia honorvorto!

Walter: Mi ordonis al vi validigi ĉi tie la juston laŭ la leĝoj, kaj mi kredas, ke la leĝoj ĉi tie en Huisum validas tiel same kiel en la unuigitaj landoj.

Adam: Mi humile petas pardonon. Ni havas ĉi tie, en Huisum, se vi permesas, siaspecajn regulojn, ne skribitajn, mi devas konfesi, tamen pruvitajn kaj liveritajn de la tradicio. De ĉi tiu formo, mi kuraĝas esperi, hodiaŭ mi eĉ joton ne deviis. Tamen ankaŭ kun via alia formo, kutima en la imperio, mi ja intimas. Ĉu vi postulas pruvon? Bone, kiel vi ordonas. Mi povas validigi la leĝojn ankaŭ tiel.

Walter: Vi vekas malbonan opinion, s-ro vilaĝestro. Sed bone, estu, kiel vi volas. Rekomencu trakti la aferon!

Adam: Honorvorte, vi estos kontenta, atentu, vi vidos. S-ino Marthe Rull, prezentu vian plendon!

S-ino Marthe: Mi plendas, vi scias, pro ĉi tiu kruĉo; tamen permesu al mi, ke antaŭ ol rakonti, kio okazis kun ĉi tiu kruĉo, mi priskribu, kio ĝi estis por mi antaŭe!

Adam: La parolo estas la via.

S-ino Marthe: Ĉu vi vidas la kruĉon, altestimataj sinjoroj? Ĉu vi vidas ĝin?

Adam: Ho jes, ni vidas ĝin.

S-ino Marthe: Nenion vi vidas, se vi permesas, vi vidas rompitaĵon, la plej bela kruĉo disfalis en du pecojn. Ĉi tie, ĝuste ĉe la breĉo, kie nun nenio estas, estis transdonitaj ĉiuj nederlandaj provincoj al la hispana Filipino. Ĉi tie staris en festa kostumo imperiestro Karlo la 5a: de li vi vidas stari nur la piedojn. Ĉi tie genuis Filipino kaj akceptis la kronon; nun li kuŝas en la kruĉo, escepte la postaĵon, sed ankaŭ ĝi ricevis puŝon. Tie frotis emociite siajn okulojn liaj du onkloj, la reĝino de la francoj kaj tiu de Hungario; se oni rigardas, ke unu el ili levas la manon kun tuko, ŝajnas, kvazaŭ ŝi plorus pri si mem. Ĉi tie en la eskorto apogis sin Filiberto, la hakon sur kiun la imperiestro deturnis, ankoraŭ sur la glavo, sed nun li devis fali, same kiel Maksimiliano, tiu fripono! La glavoj sube estas forbatitaj. Ĉi tie en la mezo oni vidis stari la ĉefepiskopon de Arras kun la sankta mitro; lin kun ĉio lia forportis la diablo,

nur lia ombro falas laŭlonge de la pavimo. Ĉi tie en la fundo staris rondo de gvardianoj kun amaso da halebardoj kaj piklancoj, kaj jen ĉi tie la domoj sur la brusela ĉefplaco, scivolanto elŝovas la kapon el la fenestro: sed kion nun li vidas, tion mi ne scias.

Adam: S-ino Marthe! Ŝparu al ni paroli pri la dispecigita pakto, se ĝi ne apartenas al la kerno. Nin interesas la breĉo, ne la provincoj, kiuj estis sur ĝi transdonitaj.

S-ino Marthe: Pardonu, ke la kruĉo estas bela, apartenas ja al la afero! La kruĉon predis Childerich, la kaldronflikisto, kiam Vilhelmo de Oranjo sturmis Briel kun la maraj geŭzoj. Ĝin, plenan de vino, levis ĝuste hispano al la buŝo, kiam Childerich de malantaŭe mortpikis la hispanon, kaptis la kruĉon, malplenigis ĝin kaj pluiris.

Adam: Inda mara geŭzo.

S-ino Marthe: Poste la kruĉon heredis Fürchtegott, la tombofosisto. Li, la sobra trinkis el la kruĉo nur trifoje, ĉiam almiksante akvon. La unuan fojon, kiam en aĝo de sesdek jaroj li prenis edzine junan virinon; tri jarojn poste, kiam ŝi faris lin feliĉa patro, kaj post kiam ŝi ankoraŭ akuŝis al li dek kvin infanojn, li trinkis triafoje por ŝia morto.

Adam: Ankaŭ tio ne estas malbona.

S-ino Marthe: Poste la kruĉo venis al Zachaeus, tajloro en Tirlemont, kiu proprabuŝe rakontis al mia karmemora edzo, kion mi nun volas sciigi al vi. Kiam la francoj predadis, li elĵetis la kruĉon kun ĉiuj domutilaĵoj el la fenestro, ankaŭ li mem elsaltis poste kaj la mallerta rompis sian nukon. Kaj ĉi tiu ordinara kruĉo el argilo falis sur la plandojn kiel kato kaj restis tute kompleta.

Adam: S-ino Marthe Rull, al la afero, se mi povas peti! Al la afero!

S-ino Marthe: Poste en la incendio de sesdek ses, tiam ĝin jam havis mia edzo, Dio ripozigu lin...

Adam: Pro diablo! Virino! Ĉu vi ankoraŭ ne estas preta?

S-ino Marthe: Se mi ne devas paroli, s-ro vilaĝestro Adam, tiam mi staras senutile ĉi tie, do mi foriros kaj trovos al mi juĝiston, kiu aŭskul-

tos min.

Walter: Vi devas ĉi tie paroli, tamen ne pri aferoj, fremdaj al via plendo. Se vi diras al ni, ke tiu kruĉo estis por vi valora, tiam ni scias tion, kiom ni bezonas por la juĝado.

S-ino Marthe: Kiom vi bezonas por la juĝado, mi ne scias kaj ankaŭ ne volas scii. Tamen mi scias, pri kio mi devas povi paroli, por fari plendon.

Walter: Do bone. Diru la finon! Kio okazis kun la kruĉo. Kio okazis en la jaro sesdek-sesa kun la kruĉo en la fajrego? Ĉu ni fine aŭdos, kio okazis kun la kruĉo?

S-ino Marthe: Kio okazis al ĝi? Nenio kun la kruĉo, mi tre petas vin, viaj moŝtoj, en la jaro sesdek-sesa al ĝi okazis nenio. La kruĉo restis netuŝita, tute kompleta en la mezo de la flamoj. Kaj mi eltiris ĝin el la cindro de la domo, la sekvan matenon mi glazuris ĝin brila. Ĝi ŝajnis kvazaŭ freŝe elveninta el la bakforno.

Walter: Nu, bone. Nun ni konas la kruĉon. Nun ni scias ĉion, kio okazis kaj kio ne kun la kruĉo. Kaj kio plia ankoraŭ?

S-ino Marthe: Kaj ĉi tiun kruĉon, vidu, jen ĉi tiun kruĉon, kiu ankaŭ dispecigita valoras unu tutan, la kruĉon indan por fraŭlina buŝo, eĉ sur la lipoj de la s-ino gubernatoredzino mem ne estus neĝustaloke, la kruĉon, viaj altestimataj moŝtoj, la kruĉon frakasis tiu fripono.

Adam: Kiu?

S-ino Marthe: Li, tiu, Ruprecht.

Ruprecht: Tio estas mensogo, s-ro vilaĝestro.

Adam: Vi silentu, ĝis oni demandas vin! Hodiaŭ ankaŭ al vi venos la vico. Ĉu vi notis ĉion en la protokolo?

Licht: Ho, jes.

Adam: Rakontu, kio okazis, estimata s-ino Marthe!

S-ino Marthe: Estis horo ĉirkaŭ la dek-unua hieraŭ...

Adam: Kiam? Bonvolu ripeti!

S-ino Marthe: Ĉirkaŭ la horo dek-unua.

Adam: Ĉu antaŭtagmeze?

S-ino Marthe: Ne, pardonu, nokte... Mi jam enlitiĝis, volis estingi la lampon, kiam alarmis min laŭtaj viraj voĉoj, tumulto en la teretaĝa dormokamero de mia filino. Kvazaŭ malamiko enrompus, mi estis terurita. Rapide mi kuras malsupren sur la ŝtupoj, mi trovas la pordon de la kamero perforte enpuŝita, furiozaj insultoj aŭdiĝas de tie, kaj kiam mi enpaŝas, prilumas la scenon, kion mi trovas, s-ro vilaĝestro, nu, kion mi trovas? La kruĉon mi trovas kuŝi frakasita en la ĉambro, en ĉiuj anguloj kuŝas ĝiaj pecoj, la filino tordas la manojn, kaj li, tiu fripono furiozas tie, meze de la ĉambro.

Adam: Ej, fulmotondro!

S-ino Marthe: Kio?

Adam: Ĉu tiel, s-ino Marthe?

S-ino Marthe: Jes. Kaj en mia prava kolero mi sentas, kvazaŭ dek brakoj kreskus al mi, ĉiu kun krifoj de vulturo. Mi tuj surloke respondecigas lin, kion li serĉas en tiel malfrua nokto, frakasante al mi la kruĉojn de la domo. Kaj li diras al mi responde, divenu kion, la senhontulo, ĉi tiu bandito, kiun mi volas vidi rompita sur rado, sen kio mi ne trovos pacon: li diras, ke iu alia depuŝis la kruĉon de sur la fenestrobreto, iu alia, imagu, kiu antaŭ li eskapis el la kamero. Kaj li superŝutas mian filinon per insultoj.

Adam: Diablo kaj infero? Kaj poste?

S-ino Marthe: Post tio mi rigardas demande la filinon, kiu staras tie kiel fulmofrapita. Ŝi sidigas. Mi demandas ŝin: Eve, ĉu estis ĉi tie iu alia. Kaj ŝi krias: "Dio mizerikorda! Kion vi pensas pri mi, patrino?" Do parolu, kiu estis ĉi tie? "Kiu krome?" ŝi diras, "Kiu alia povus esti?" Kaj ŝi ĵuras, ke nur la knabo estis.

Eve: Kion mi ĵuris al vi? Kion mi povus ĵuri al vi? Mi ĵuris nenion, al vi nenion!

S-ino Marthe: Eve!

Eve: Ne! Vi mensogas tion.

Ruprecht: Jen vi aŭdas.

Adam: Silentu, damnita hundo, nun silentu! Se vi ne volas, ke ĉi tiu pugno ŝtopu vian gorĝon! Poste venos ankaŭ via tempo, sed ne nun.

S-ino Marthe: Ĉu vi volas diri, ke vi ne...

Eve: Ne, patrino! Vi diras neveron. Vidu, en la fundo de mia animo vere tre doloras min, ke mi devas publike deklari, ke mi ĵuris nenion, nenion, mi ĵuris absolute nenion.

Adam: Estu prudentaj, infanoj!

Licht: Tio estas vere stranga.

S-ino Marthe: Ĉu vi ne certigis min, ho, Eve, ĉu ne vi vokis al "Dio mizerikorda"?!

Eve: Je Dio, ne! Ĵuron mi ne faris! Vidu, pri tio mi ĵuras. Kaj mi vokas al Dio mizerikorda.

Adam: Ej, homoj! Ej, s-ino Marthe! Kion vi faras? Kial vi timigas ĉi tiun bonan infanon? Se la pucelo repensos, ŝi trankvile memoros, kio okazis, mi diras al vi, kaj kion ŝi nun ne rakontas, kiel ŝi devus, ŝi ankoraŭ povos fari. Vi vidos, ŝi hodiaŭ deklaros tion, kion hieraŭ, ĉu ŝi ĵuros prie, ĉu ne. Sed ellasu Dion mizerikordan el la ludo!

Walter: Ne tiel, s-ro vilaĝestro! Oni ne donu al la partioj tiel ambiguajn instrukciojn!

S-ino Marthe: Se ŝi, la senhonta, ĉifona putino aŭdacas diri al mi en la vizaĝon, ke estis iu alia ol Ruprecht, pro mi ŝi povas fari... mi ne volas diri, kion. Sed mi certigas vin, s-ro vilaĝestro, eĉ se mi ne povas aserti, ke ŝi ĵuris prie, ke hieraŭ ŝi diris tion, pri tio mi ĵuras, kaj ateste mi vokas la Dion mizerikordan.

Adam: Kaj nun jam ankaŭ la pucelo...

Walter: S-ro vilaĝestro!

Adam: Via moŝto? Kion vi diras?... Ĉu ne, koreto mia Enjo?

S-ino Marthe: Eldiru la veron! Ĉu vi ne diris tion? Ĉu vi ne diris tion hieraŭ al mi, he?

Eve: Kiu neas al vi, ke mi diris tion hieraŭ?...

Adam: Jen, ŝi mem diras.

Ruprecht: La putino, la fia!

Adam: Notu!

Veit (*al Eve*): Fi, hontu!

Walter: Mi ne scias, kiel opinii pri via proceduro, s-ro vilaĝestro Adam. Se vi mem estus rompinta la kruĉon, vi ne povus pli klopode transŝovi de vi la akuzon al la junulo ol nun. S-ro notario, mi esperas, ke vi skribos nenion alian en la protokolon, nur kion la pucelo hieraŭ konfesis, ne la fakton. Ĉu nun la vico venis al la pucelo atesti?

Adam: Nu, propre ŝia vico ankoraŭ ne alvenis, sed pri tiaj aferoj oni facile eraras, via moŝto. Kiun mi devus nun pridemandi? Ĉu la akuziton? Tre bone, bonajn instruojn mi volonte akceptas.

Walter: Kiel senĝena!... Jes, demandu lin. Demandu, faru finon, mi tre petas vin: ĉi tiu estas ja la lasta afero, en kiu vi procedas.

Adam: Ĉu la lasta? Kio?! Nu jes, la akuziton. Kien vagas viaj pensoj, maljuna vilaĝestro? Estu malbenita tiu pipsa numido! Ho, se ĝi estus por eterne ferminta sian pepilon pro pesto en Hindio! Min daŭre okupas tiu nudela bulo.

Walter: Kio okupas vin? Kia bulo okupas vin?

Adam: La nudela bulo, pardonu, kiun mi devas doni al la birdaĉo. La bestaĉo ne emas gluti pilolojn. Honorvorte, mi ne scias, kion fari.

Walter: Faru vian devon, mi diras, mil diabloj!

Adam: Akuzito, paŝu antaŭen!

Ruprecht: Jen mi, s-ro vilaĝestro. Ruprecht, filo de la kamposervisto Veits, naskita en Huisum.

Adam: Ĉu vi aŭdis, kion s-ino Marthe ĵus deklaris antaŭ la justico kontraŭ vi?

Ruprecht: Jes, s-ro vilaĝestro. Mi aŭdis.

Adam: Ĉu vi kuraĝas aserti ion kontraŭan, aŭ ĉu vi aŭdacas nei tion

kiel diospita obstinulo?

Ruprecht: Kion kontraŭan mi povas aserti? Ej! Kun via permeso, ŝi diris eĉ ne unu veran vorton.

Adam: Ĉu tiel? Kaj ĉu vi opinias povi ankaŭ pruvi tion?

Ruprecht: Ho, jes.

Adam: Sinjorino tiel estiminda kiel... S-ino Marthe, trankviliĝu! Elguŝiĝos la vero!

Walter: Kion komunan vi havas kun s-ino Marthe, s-ro vilaĝestro?

Adam: Kio koncernas tion... Je Dio... Mi, kiel kristano...

Walter: Diru, kion vi povas kontraŭmeti por via defendo!... S-ro notario, ĉu vi scipovas gvidi la proceson?

Adam: Aĥ, kio estas tio?

Licht: Ĉu mi... ĉu nun... se via moŝto...

Adam: Kial vi gapas en la mondon? Vi aŭdis, kion vi povas kontraŭmeti? Ĉu ne kiel bovo staras tie la azeno? Kion vi povas kontraŭmeti?

Ruprecht: Ĉu kontraŭmeti?

Walter: Jes, kontraŭmeti. Rakontu, kiel tio okazis!

Ruprecht: Dio mia, se oni lasus min fine paroli!

Walter: Tio estas vere netolerebla, s-ro vilaĝestro!

Ruprecht: Ĉirkaŭ la deka devis tempi nokte, kaj la januara nokto estis varma kiel maja... mi diris al patro: Patro, mi transiras por tempeto al Eve. Ĉar mi volis edzinigi ŝin... tion vi devas scii, ŝi estas brava knabino, mi vidis ŝin labori dum la rikolto, la laboro kvazaŭ bolis en ŝiaj manoj, la fojno flugis el ŝia mano, ke vidi apenaŭ oni povis. Mi demandis ŝin: ĉu vi volas? Kaj ŝi diris: „Aĥ! Kion vi gakas?” Kaj poste ŝi aldonis: „Jes.”

Adam: Restu ĉe la afero. Gaki? Kio estas gaki? Vi demandis: Ĉu vi volas? Kaj ŝi respondis: Jes.

Ruprecht: Jes, tiel, honorvorte, s-ro vilaĝestro.

Walter: Plu! Ni iru plu!

Ruprecht: Nu... tiam mi diris, aŭdu patro! Permesu, ke ni ankoraŭ iom babilu ĉe la fenestro. „Nu, bone”, li diris. „Ĉu vi restos ekstere?” li demandis. Jes, kompreneble, mi diris, je mia honorvorto. „Nu, bone”, li diris, „iru, je la dek-unua estu hejme!”

Adam: Vi nur muelas, muelas, la langon pelas. Ĉu vi baldaŭ finos?

Ruprecht: Mi promesas, kompreneble, prenas la ĉapon kaj ekmarŝas. Mi volas iri sur la pado, sed ĉar la rivereto ŝvelis, mi devis reiri tra la vilaĝo. Ej, damnite, Ruprecht, mi ekmemoris, la ĝardeno pordo de ges-roj Marthe estas nun ŝlosita, ĉar nur ĝis la deka la knabino lasas ĝin nefermita, se ĝis tiam mi ne estas tie, mi ja ne plu venas.

Adam: Facilmora kutimo.

Walter: Nu, kaj kiel plu?

Ruprecht: Poste, dum mi proksimiĝas tra la tilia aleo, ĉe la domo de Marthe, kie la frondoj dense volbiĝas kaj estas mallume, kiel en la katedralo de Utrecht, mi aŭdas knari la ĝardenan pordon. Ho, vidu, Eve estas ankoraŭ ekstere! mi pensas kaj tute ĝoja, mi turnas mian rigardon tien, de kie miaj oreloj alportis la bonan novaĵon. Sed kiam miaj okuloj revenas, mi nomas ilin blindaj kaj senplie resendas ilin tien, de kie ili venis, por ke ili pli zorge ĉirkaŭrigardu, kaj mi skoldas ilin fiaj kalamniantoj, incitantoj, malindaj orelklaĉantoj, kaj ankaŭ triafoje mi resendas ili tien, kaj dume mi pensas pri tio, ke post kiam ili faris sian devon, ili pro kolero elŝiriĝos el mia kapo kaj serĉos al si novan servon: ja vere Eve estas tiu, je la veŝto mi rekonas ŝin, sed ŝi ne estas sola, ankaŭ iu alia estas kun ŝi.

Adam: Ĉu? Ankoraŭ iu alia? Kaj kiu, vi ĉiosciulo?

Ruprecht: Kiu? Ja ankaŭ mi mem tion demandas...

Adam: Nu, sekve: kiu ne estas kaptita, ne estas senkapigita.

Walter: Rakontu plu! Ne ĉesu kun la parolo! Lasu lin, s-ro vilaĝestro, kial vi interrompas lin?!

Ruprecht: Mi ne farus pri tio sanktan ĵuron, estis fulge mallume, kaj en mallumo ĉiuj katoj estas grizaj. Sed vi devas scii, ke la ŝuflikisto Leb-

recht, kiu antaŭ nelonge finis sian metilernadon, jam delonge flirtas ĉirkaŭ la knabino. La pasintan aŭtunon mi jam diris: aŭdu, Eve, la fripono ŝteliras ĉirkaŭ via domo, tio ne plaĉas al mi. Diru al li, ke vi ne estas predo por li. Mi eljetos lin el via korto, je mia honorvorto! Ŝi respondis: „Mi kredas, vi spionas min.” Tamen ŝi diris ion al li, kio estis nek viando, nek fiŝo. Tiam mi aliris kaj eljetis la friponon.

Adam: Ĉu? Ĉu la ulo nomiĝas Lebrecht?

Ruprecht: Jes, Lebrecht.

Adam: Bone. Almenaŭ unu nomo. Ni klarigos ĉion. Ĉu vi notis ĝin en la protokolo, s-ro notario?

Licht: Ho, jes, kaj ankaŭ ĉion alian, s-ro vilaĝestro.

Adam: Parolu plu, Ruprecht, karulo.

Ruprecht: Nun, ke mi vidas la pareton je la dek-unua sonorilbato – mi iras kutime je la deka hejmen –, eklumas kandelino en mia kapo. Mi pensas: haltu, Ruprecht, nun ankoraŭ estas tempo, ankoraŭ ne kreskas viaj kornoj; palpu singarde la frunton, ĉu ne tuberas io simila al kornoj. Mi singarde enpuŝas la ĝardenan pordon kaj kaŝas min en taksuso kaj mi aŭdas interflustradon, ŝercajn vortojn, s-ro vilaĝestro, tian petoladon, ke mi ekhavis la deziron...

Eve: Ha, vi maliculo! Kia infamio!

S-ino Marthe: Fripono! Mi montros al vi miajn dentojn, ni restu nur solaj. Atendu, vi ankoraŭ ne scias, kiel amara estas mia galo! Sed vi ekscios!

Ruprecht: Kvaronhoron tio daŭras. Mi pensas, kio ankoraŭ okazos hodiaŭ, ĉu eble nupto? Kaj antaŭ ol mi elsaltigis la penson, huŝ!, ili ambaŭ estas jam en la domo, eble antaŭ la pastoro.

Eve: Ni iru, patrino, okazu, kio devas okazi...

Adam: Silentu, he, mi konsilas, ke fulmo frapu vin, neinvitita babilulino! Atendu, ĝis mi vokos vin al konfeso!

Walter: Tre kurioze, je Dio!

Ruprecht: Tiam mi sentas, s-ro vilaĝestro Adam, ekboli mian sangon. Aeron! La butono sur mia brusto desaltas: aeron! Kaj mi ŝirmalfermas mian veŝton: aeron, mi diras. Kaj mi aliras, premas kaj puŝas kaj batas la pordon de la putino, kiun mi trovas ŝlosita. Tiam per unu piedbato perforte mi enpuŝas ĝin.

Adam: Filo de fulmotondro, vi!

Ruprecht: Kaj kiam la pordo ekknaras, la kruĉo falas de la fenestro-breto en la ĉambron. Kaj huŝ! Iu elsaltas tra la fenestro. Mi ankoraŭ vidas flirti la baskojn de lia palto.

Adam: Ĉu tiu estis Lebrecht?

Ruprecht: Kiu do alia, s-ro vilaĝestro? La knabino staras tie, mi puŝas ŝin flanken, kuras al la fenestro kaj mi ankoraŭ trovas la friponon pendi inter la fostoj de la latiso, sur kiu la vito rampas ĝistegmente. Kaj ĉar la klinko restis en mia mano, kiam mi enrompis la pordon, per la ŝtalo mi svingas pezan baton sur lian kapon, kiun mi, s-ro vilaĝestro, mi ĝuste povis atingi.

Adam: Ĉu tio estis klinko?

Ruprecht: Kio?

Adam: Ĉu...

Ruprecht: Jes, la klinko de la pordo.

Adam: Mi kred...

Licht: Vi verŝajne kredis, ke glavo, ĉu?

Adam: Ĉu glavo? Ĉu mi, kial?

Ruprecht: Ĉu glavo?!

Licht: Ej nu, oreloj povas misaŭdi. Ŝtalo ja multe similas al glavo.

Adam: Tamen mi dirus...

Licht: Mi vetus: tenilo, s-ro vilaĝestro!

Adam: Tenilo!

Ruprecht: Ĉu tenilo! Sed ĝi ne estis tenilo. Ĝi estis la alia ekstremo de

la klinko.

Adam: La alia ekstremo de la klinko!

Licht: Tiel, do, tiel do!

Ruprecht: Tamen sur ĝia tenilo estis plumba bulo, kiel ĉe glavofusto, mi devas diri.

Adam: Jes, kiel tenilo.

Licht: Bone. Kiel glavofusto. Tamen ĝi devis esti ia insida armilo, mi bone sciis tion.

Walter: Sed daŭre al la afero, sinjoroj! Al la afero!

Adam: Nuraj negravaĵoj, s-ro notario. Do ni iru plu!

Ruprecht: Tiam la ulo falas, kaj mi volas returni min, kiam en la mallumo mi vidas, ke li metas sin pene sur la plandojn. Mi pensas: ĉu vi ankoraŭ vivas? Kaj mi saltas sur la fenestrobreton kaj volas malhelpi al li la fuĝon, kaj tiam, sinjoroj, kiam mi ĝuste estis saltonta, manpleno da malfajna sablo hajlis en miajn okulojn, kaj la fripono kaj la nokto kaj la mondo kaj la fenestrobreto, sur kiu mi staris, ĉio ŝajnis kolapsi kiel malplena sako, punu min Dio, se ĉio ne tiel okazis.

Adam: Damnite! Fari ion tion? Kiu kulpis tion?

Ruprecht: Kiu? Lebrecht.

Adam: Fripono!

Ruprecht: Je mia honorvorto... se li estis...

Adam: Kiu alia?!

Ruprecht: Kvazaŭ hajlotempesto forbalaus min de dek-klafta deklivo, mi falegas el la fenestro en la ĉambron. Mi pensas, mi batrompos sub mi la plankon. Tamen mi ne rompis al mi la nukon, nek la sakron, la koksojn kaj nenion alian, sed dume mi lasis eskapi la maliculon. Kaj mi sidiĝas, viŝas la okulojn, kaj venas Eve kaj krias: „Aĥ, Di-Sinjoro!” kaj „Ruprecht! Kio trafis vin?” Tiam mi levis la piedon, bone, ke mi ne vidis, kien mi puŝas ĝin.

Adam: Ĉu pro la sablo?

Ruprecht: Jes, pro la sablo.

Adam: Nu, ĝi trafis mezen!

Ruprecht: Kaj dum mi stariĝas, mi pensas: kial malpurigi miajn manojn? Tial mi nur skoldas ŝin kaj diras al ŝi: senhonta putino, kaj pensas, ke tio sufiĉas al ŝi. Tamen, kiel vi vidas, larmoj sufokas miajn vortojn. Ĉar kiam s-ino Marthe paŝas nun en la ĉambron, levas la lampon, kaj mi vidas antaŭ mi la knabinon, tremante, en kompatinda stato, kiu cetere ĉiam estis tiel bonkora, mi diras al mi: esti blinda kelkfoje estas ja ankaŭ ne malbone. Kaj mi donus tiam miajn du okulojn al ajnulo, por ke li pilkludu per ili.

Eve: Ne meritas tion la latrono...

Adam: Vi silentu!

Ruprecht: La ceteron vi scias.

Adam: Kiel la ceteron?

Ruprecht: Nu jes, venis s-ino Marthe kaj komencis stridi, kaj venis Ralf, la najbaro, kaj Hinz, same najbaro, kaj venis onklino Suzano kaj onklino Liese. Kaj venis servistoj kaj servistinoj kaj hundoj kaj katoj, iĝis pandemonio, kaj s-ino Marthe demandis la pucelon, kiu rompis la kruĉon. Kaj ŝi, ŝi diras, vi scias, ke estis mi. Je mia fido, ŝi ne tre malpravis, sinjoroj. La kruĉon, kun kiu ŝi iris por akvo – vi ja scias, longe ĉerpas la kruĉo, ĝis ĝi fine rompiĝas – frakasis mi, kaj la ŝuflikisto havas la breĉon en la kapo.

Adam: S-ino Marthe! Kion vi objetas al tio? Parolu!

S-ino Marthe: Kion mi objetas? Ke tiu, s-ro vilaĝestro, kiel foino enrompas kaj strangolas la veron kiel klukantan kokinon. Kiu ŝatas juron, kaptus klabon, por ekstermi ĉi tiun monstron de la nokto.

Adam: Tamen vi devas prezenti al ni la pruvon.

S-ino Marthe: Ho jes, tre volonte. Jen ĉi tie estas mia atestanto. Parolu!

Adam: Ĉu via filino? Ne, s-ino Marthe.

Walter: Ĉu ne? Kial ne?

Adam: Ĉu kiel atestanto, altmoŝta sinjoro? Ĉu ne tekstas en la kodo *titulo quarto* aŭ *quinto*⁴, ke se junaj buboj frakasas kruĉojn aŭ mi ne scias, kion alian, filinoj ne atestu por siaj patrinoj?

Walter: En via kapo kuŝas kunkneditaj scienco kaj eraro, intime kiel pasto, per ĉiu tranĉo vi donas al mi iun el ambaŭ. La pucelo ankoraŭ ne atestas, nur deklaras: kaj por kiu ŝi volas kaj povas atesti, sciiĝos nur el tio, kion ŝi nun diros.

Adam: Jes, deklari. Bone. *Titulo sexto*. Sed kion ŝi diros, oni ne kredos.

Walter: Paŝu antaŭen, karulino!

Adam: He! Liese! Ĉu vi permesas? La lango sekiĝis al mi. Grete!

Oka sceno

La antaŭaj. Servistino enpaŝas.

Adam: Glason da akvo!

Servistino: Tuj! (*for*)

Adam: Ĉu mi povas ankaŭ al vi?...

Walter: Mi dankas.

Adam: Ĉu frankan aŭ mozelan?⁵

Walter (*neas, la servistino alportas akvon kaj foriras*).

Naŭa sceno

Walter, Adam, s-ino Marthe ktp. sen la servistino

Adam: Se mi povas libere paroli, sinjoro, la afero maturiĝis por kompromiso.

Walter: Ĉu por kompromiso? Tio ne estas klara, s-ro vilaĝestro. Prudentaj homoj povas veni al kompromiso, tamen kiel vi volas jam fari

⁴ Titolo quarto, quinto (latine): laŭ artiklo kvar, kvin de la procesa proceduro.

⁵ Ĉu frankan aŭ mozelan?: vinon.

kompromison, kiam la afero ankoraŭ ne estas malimplikita? Aŭdi tion de vi tre interesus min. Diru al mi, kiel vi imagas efektiviĝi ĝin? Ĉu vi jam vortigis la verdikton?

Adam: Mi certas kaj asertas, se la leĝo lasas min en kaĉo, mi devas voki helpe filozofion, tiel do Lebrecht estis...

Walter: Kiu?

Adam: Aŭ Ruprecht...

Walter: Kiu?

Adam: Aŭ Lebrecht, kiu rompis la kruĉon.

Walter: Kiu do estis la farinto. Ĉu Lebrecht aŭ Ruprecht? Mi vidas, vi elfiŝas la verdikton kiel mano pizojn el plena sako.

Adam: Permesu al mi!

Walter: Silentu, silentu, mi petas vin.

Adam: Kiel vi volas. Je mia honorvorto, al mi estus tute konvene, se ili ambaŭ estus la farintoj.

Walter: Demandu, tiel vi ekscios.

Adam: Tre volonte. Sed mi nomiĝu fripono, se vi elfiŝos la veron. Ĉu la protokolo estas en ordo?

Licht: Perfekte.

Adam: Bone.

Licht: Kaj mi malfermos novan paĝon, scivola, kio skribiĝos sur ĝi.

Adam: Ĉu novan paĝon? Bone ankaŭ tiel.

Walter: Parolu do, knabino!

Adam: Parolu, Enjo, ĉu vi aŭdas, parolu nun, pucelo Enjo! Donu al Dio, ĉu vi aŭdas, koreto mia, donu, karulinjo al Li kaj al la mondo, donu iom el la vero. Ne forgesu, ke ĉi tie vi staras antaŭ la juĝa seĝo de Dio, kaj vi ne malĝojigu vian juĝiston per neado kaj per babilaĉoj, ne apartenantaj al la afero. Sed kial diri? Vi estas saĝa. Juĝisto, vi scias, estas kaj restas ĉiam juĝisto, kaj hodiaŭ bezonas lin Petro, kaj morgaŭ bezonos

lin Paŭlo. Se vi diros, ke tio estis Lebrecht: do bone; kaj se vi asertos, ke tio estis Ruprecht: same bone! Parolu do, parolu, oni nomu min fripono, sed ne ĉio estos tiel, kiel vi deziras. Sed se vi volus klaĉi, babilaci kaj suspekti senpripense eble trian personon, nomi absurde neblan nomon: vidu, infano, gardu vin, mi ne bezonas pli diri. En Huisum, damnite, neniu kredos al vi, neniu, Enjo, en tutaj Nederlandoj. Vi scias, la blankaj muroj ne atestas, tiu alia same scipovas defendi sin: kaj vian Ruprecht forprenos falmalsano.

Walter: Vi jam finu tiajn parolojn! Ili estas babilaĉoj sen senco kaj esenco.

Adam: Ĉu via moŝto ne komprenas min?

Walter: Daŭrigu! Vi jam tro longe parolis en via juĝista seĝo.

Adam: Bedaŭrinde mi ne faris studojn, altmoŝta sinjoro. Mi estas nekomprenebla al vi, sinjoroj el Utrecht, kun ĉi tiu popolo oni kutimas paroli alimaniere. La pucelo scias, mi vetus, kion mi celas.

S-ino Marthe: Tro multe da babiloj. Nun venu la parolo sincera!

Eve: Ho, karega patrino!

S-ino Marthe: He vi, mi konsilas al vi...

Ruprecht: Ej, s-ino Marthe, estas malfacile paroli, se la konscienco strangolas la gorĝon.

Adam: Silentu, vi, ĉiosaĝulo, eĉ silabon ne pli!

S-ino Marthe: Kiu estis tiu?

Eve: Ho, Jesuo!

S-ino Marthe: Tiu gapabuŝulo! Tiu fiulo! Ho, Jesuo! Ĉu mia filino estus putino? Ĉu tio estis Jesuo?

Adam: Ej, s-ino Marte, kiaj manieroj? Lasu en paco tiun knabinon! Vi timigas ŝin. Putino ŝtipkapa! Tiel ŝi diros al ni nenion. Baldaŭ ŝi jam rememoros.

Ruprecht: Ho, jes, ŝi rememoros.

Adam: Vi, tie, tenu la buŝon!

Ruprecht: La ŝuflikisto venos al ŝi en la menson.

Adam: Vi, satanido! Voku la provoson! He! Hanfriede!

Ruprecht: Bone, bone! Mi silentos, s-ro vilaĝestro, estu tiel! Ŝi ja venos ankaŭ sen tio al mia nomo.

S-ino Marthe: Aŭdu, he, ne faru ĉi tie spektaklon, mi diras. Mi fariĝis kvardek-naŭjara en honoro: volonte mi ĝisvivus la kvindekan. La trian de februaro estos mia naskiĝtago; hodiaŭ estas la unua. Faru mal-longe! Kiu estis tio?

Adam: Bone, de mia flanko. Bone, s-ino Marthe Rull!

S-ino Marthe: Via patro diris mortonte: „Aŭdu, Marthe, akiru por la knabino bravan viron; kaj se ŝi fariĝos leĝermora putino, donu groŝon al la tombofosisto, li rekuŝigu min sur la dorson, ĉar je honorvorto, mi turniĝos tiam en mia tombo.

Adam: Nu, ankaŭ tio ne estas malbona.

S-ino Marthe: Mia Enjo, ĉu vi volas estimi vian patron kaj vian patr-inon laŭ la kvara dekaloga ordono? Bone, tiam diru: mi enlasis en mian kameron la ŝuflikiston aŭ iun trian. Ĉu vi aŭdas? Sed tio estis ne la fianĉo.

Ruprecht: Mi kompatas ŝin. Lasu do la kruĉon, mi petas vin. Mi portos ĝin al Utrecht. Tian kruĉon... Ho, se mi estus ĝin frakasinta en pecojn!

Eve: Kiel pitanima vi estas! Fi, hontu, vi devus diri: „Bone, mi rompis ĝin.” Fi, Ruprecht, hontu, ke vi ne fidis miajn agojn. Ĉu mi ne donis al vi la manon, ĉu mi ne diris jes al vi, kiam vi demandis min: „Eve, ĉu vi volas edziniĝi al mi?” Ĉu vi eble opinias, ke vi valoras malpli ol la ŝu-isto? Eĉ se vi vidus min tra la serurtruo trinki el tiu kruĉo kun Lebrecht, vi devus pensi: „Eve estas bona knabino, ĉio klariĝos je ŝia honoro, kaj se ne en ĉi tiu vivo, certe en la alia, kaj plej malfrue en la tago de la lasta juĝo.”

Ruprecht: Je mia vorto, tio daŭras tro longe, Enjo. Mi volonte kredas tion, kion mi povas preni per la manoj.

Eve: Ni supozu, ke tio estis Lebrecht, ĉu vi do opinias, ke... Mi mortu

per la eterna morto, se ne ĝuste al vi mi tuj konfesus tion. Ni supozu, ke mi havis kaŭzon silenti antaŭ la najbaroj, servistoj kaj servistinoj: kial, Ruprecht, diru, kial mi ne povus malkaŝi, surbaze de via fido al mi, ke tio estis vi? Kial ne? Respondu: kial ne?

Ruprecht: Do diru, damnite, mi ne oponas: diru tion, se vi povas eviti la punkolonon!

Eve: Ho, vi abomena! Vi sendanka! Vi meritus vere, ke mi evitu la punkolonon! Vi meritus, ke per unu vorto mi reakiru mian honoron kaj puŝu vin en pereon!

Walter: Nu? Kaj kio estus tiu unusola vorto? Ne retenu nin! Ruprecht do ne estis tio, ĉu?

Eve: Ne, altmoŝta sinjoro, eĉ se li volus tiel, nur pro li mi prisilentis, ke Ruprecht frakasis neniun kruĉon, eĉ se li mem neus tion, vi povas kredi min.

S-ino Marthe: Eve! Ĉu ne Ruprecht rompis ĝin?

Eve: Ne, patrino, ne! Kaj se mi hieraŭ diris tion, tio estis mensogo.

S-ino Marthe: He, vi, mi rompos al vi ĉiujn ostojn! (*Demetas la kruĉon.*)

Eve: Faru, kion vi volas!

Walter (*minace*): S-ino Marthe!

Adam: He, provoso, he! Elĵetu ŝin, la damnititan virinaĉon! Kial ĝuste Ruprecht tio devus esti? Ĉu vi tenis la kandelon? La pucelo, mi kredas, devas tion scii: mi estu rano en flako, se tio ne Lebrecht estis.

S-ino Marthe: Ĉu eble Lebrecht tio estis? Ĉu Lebrecht estis?

Adam: Parolu, Enjo, Lebrecht tio estis, mia koreto, ĉu?

Eve: Vi senhonta, vi! Vi fia! Kiel vi povas diri, ke tio estis Lebrecht?!

Walter: Pucelo! Kion vi aŭdacas permesi al vi? Ĉu tia estas la respekto, kiun vi ŝuldas al la vilaĝestro?

Eve: Ba, la vilaĝestro! Li meritas stari kiel mizera deliktulo antaŭ la tribunalo. Li plej bone scias, kiu estas la rompinto! (*turnante sin al la vilaĝestro*) Ĉu ne vi sendis hieraŭ Lebrecht en la urbon antaŭ la kon-

skripcian komisionon kun la listo de la rekrutoj? Kiel vi povas aserti, ke tio estis Lebrecht, kiam vi bone scias, ke li estas en Utrecht?!

Adam: Nu, sed kiu cetera? Se ne Lebrecht, mil diabloj, se vi ekskludas Ruprecht, same Lebrecht... Kion vi do celas?

Ruprecht: Je mia vorto, s-ro vilaĝestro Adam, permesu al mi diri, pri tio la pucelo verŝajne ne mensogas. Hieraŭ mi mem renkontis Lebrecht, kiam li marŝis al Utrecht, estis frumatene, je la oka horloĝbato, kaj se li ne petis sidiĝi sur ĉaro, la ulo, kia kurbakrura li estas, ĝis la deka horloĝbato nokta li ankoraŭ ne povis esti reamblinta hejmen. Certe devis esti iu tria.

Adam: Kurbakrura? Kion vi diras, vi stultulo?! Li marŝas tiel, ke estas plezure vidi. Mi ne havu, nur unu piedon, se ŝafhundo de meza kresko ne devus troti ĉiuklopode, por teni kun li la ritmon.

Walter: Rakontu al ni la tutan okazintaĵon!

Adam: Pardonu, altmoŝta sinjoro! Por tio la pucelo apenaŭ taŭgas.

Walter: Ĉu ŝi ne taŭgas? Ĉu por tio? Kaj kial ne?

Adam: Vi vidas: simplamensa infano. Bona, tamen naivaĉa. Nematura, apenaŭ konfirmaciita; ŝi hontas, se ŝi vidas barbon de malproksime. Simpla infano de la popolo. En mallumo tiaj toleras, kion ĉe tago ili neas antaŭ sia juĝisto.

Walter: Vi estas tre cedema, s-ro vilaĝestro Adam, tre milda en ĉio, kio koncernas la pucelon.

Adam: Por diri la veron, inspektista moŝto, ŝia patro estis mia bona amiko. Se via moŝto bonvolus esti hodiaŭ favorkora, tiam ni faru hodiaŭ ne pli ol nian devon, kaj ni lasu iri lian filinon.

Walter: Mi male, sentas en mi grandan emon, s-ro vilaĝestro, veni tute ĝis la fundo de la afero. Estu kuraĝa, infano mia, diru, kiu rompis la kruĉon! En ĉi tiu momento vi ne staras antaŭ tia homo, kiu ne pardonas eraran paŝeton.

Eve: Kara, atestimata kaj favorkora sinjoro, forpermesu al mi rakonti la okazintaĵon. Kaj ne juĝu min malbona pro ĉi tiu rifuzo. Estas la mis-

tera volo de la ĉielo, kiu fermas mian buŝon en ĉi tiu afero. Ke Ruprecht ne rompis tiun kruĉon, mi pretas konfirmi al vi per sankta ĵuro antaŭ la altaro, se vi deziras. Tamen la hieraŭaj eventoj kun ĉiuj ĝiaj konsekvencoj koncernas min, ja patrino ne povas pretendi tutan brodaĵon pro unusola, trairanta fadeno, kiu estas la ŝia. Mi ne povas ĉi tie riveli, kiu rompis la kruĉon, mi devus tuŝi sekretojn, kiuj estas ne la miaj, kaj havas nenion komunan kun la kruĉo. Frue aŭ malpli frue mi malkaŝos ilin al ŝi, sed la tribunalo ĉi tie ne estas loko, kie ŝi rajtus postuli tion de mi.

Adam: Ne, laŭjure ne. Je mia honorvorto, ne. La pucelo scias, kie estas starigitaj niaj bariloj. Se vi volas fari ĵuron ĉi tie, antaŭ la tribunalo, tiam la plendo de via patrino forfalas: kontraŭ tio nenio objeteblas.

Walter: Kiel vi opinias, s-ino Marthe, pri ĉi tiu klarigo?

S-ino Marthe: Se ne tuj mi donas al vi, altestimata sinjoro, kontentigan respondon, estas nur pro tio, ke mia lango estas paralizita. Okazas ne unu fojon, ke homo perdita, por savi sian honoron en la okuloj de la mondo, ĵuras false antaŭ juĝisto, sed ke oni faru falsan ĵuron antaŭ altaro, por trafi fine al punkolono, tion la mondo hodiaŭ vidas la unuan fojon. Se estus vere, ke iu alia, kaj ne Ruprecht, englitis hieraŭ en ŝian kameron, se ankaŭ nur home estus eble, sinjoro, kredu al mi, mi ne lasus perdi la tempon. Mi elkondukus mian filinon kun sako kaj pako antaŭ la pordon kaj dirus al ŝi: "Iru, mia filino, la mondo estas vasta kaj ne bezonatas lupago, kaj viaj haroj estas sufiĉe longaj, por ke pli aŭ malpli frue vi povu pendigi vin sur ili".

Walter: Trankvile, s-ino Marthe, nur trankvile!

S-ino Marthe: Sed ĉar mi povas trovi sufiĉe da pruvoj ankaŭ sen mia filino, kiu rifuzas helpi al mi, kaj ĉar mi estas profunde konvinkita, ke estis Ruprecht, kaj neniuj aliaj, kiu rompis la kruĉon, ilia obstino nei vekas en mi alian teruran suspekton. La pasinta nokto kaŝas alian delikton, ne nur la frakason de mia kruĉo. Via moŝto devas scii, ke Ruprecht enestas en la konskripcia listo kaj post kelkaj tagoj li devos ĵuri fidelecon al la standando en Utrecht. Nu, niaj rekrutoj ofte emas eskapi. Ni povas supozi, ke hieraŭ nokte li diris al ŝi: „Kiel vi opinias,

Enjo? Venu kun mi! La mondo estas vasta. Vi havas la ŝlosilojn por la kestoj kaj ŝrankoj..."Ŝi versajne forfermis sin, kaj tiel, kiam mi enpaŝinte, perturbis ilin, povis okazi la resto, kiun ni konas, deflanke de li pro venĝo, deflanke de ŝi pro amo.

Ruprecht: Ha, la fia serpento! Kion ŝi diras?! La ŝlosilojn de la kestoj kaj ŝrankoj!

Walter: Silenton!

Eve: Eskapi? Ĉu li?!

Walter: Al la afero. Ni parolas ĉi tie pri la kruĉo. Donu pruvon, pruvon, ke Ruprecht rompis ĝin!

S-ino Marthe: Bone, altnoŝta sinjoro. Unue mi pruvos al vi, ke Ruprecht rompis al mi la kruĉon, poste mi iros hejmen vidi, ĉu en mia domo ĉio restis sialoke. Vi vidos, ke por ĉiu vorto, kiun li diris, mi alkondukos atestanton por mia pravo, kaj mi estus alkondukinta pli frue atestantojn po dozenoj, se mi povus eĉ nur imagi, ke ŝi rifuzos al mi helpi. Sed sufiĉas, se vi igos voki nun s-inon Brigitte, onklinon de Ruprecht, ŝi refutos ĝuste la ĉefan punkton. Ŝi fakte jam vidis lin en la ĝardeno je la deka kaj duono, notu bone, pli frue, ol la kruĉo estis rompita, dum li disputis kun Eve. Kiel ĉi unusola atesto starigos la elcerbigitan fabelon de la kapo sur la plandojn, tion mi cedas al vi prijuĝi, estimataj juĝistaj moŝtoj.

Ruprecht: Kiu vidis min?

Veit: Ĉu fratino Brigitte?

Ruprecht: Ĉu min kun Enjo? Ĉu en la ĝardeno?

S-ino Marthe: Lin kun Eve en la ĝardeno ĉe la sonorilbato de la deka kaj duono, antaŭ ol, kiel li babilaĉis, je la dek-unua li surprize enrompis en la ĉambron, disputante, jen drolote, jen akraŭoĉe, kvazaŭ li volus persvadi ŝin al io.

Adam (al si): Damnite! La diablo favoras min.

Walter: Alkonduki ĉi tiun virinon!

Ruprecht: Sinjoroj, mi petas vin: tio estas ne vera parolo, tio ne eblas.

Adam: Tremu, fripono! He! La provoson! Hanfriede! Ĉar dum rifuĝo rompiĝas kruĉoj... S-ro notario, iru, alkonduku s-inon Brigitte!

Veit: Aŭdu, vi damnita fiulo, kion vi faris? Gardu vin, mi rompos al vi ĉiujn ostojn!

Ruprecht: Kial do?

Veit: Kial vi prisilentis, ke je sonorilbato de la deka kaj duono vi flirtis ĉirkaŭ la putino en la ĝardeno?

Ruprecht: Kial mi prisilentus? Mil fulmoj kaj tondroj, ĉar tio ne estas vera, patro! Se onklino Brigitte atestos, do mi estu pendumita. Kaj aldone ŝi, por mia kontento, je la piedoj.

Veit: Sed se ŝi atestos tion, gardu vin! Vi kaj tiu puranima Eve vane aktoras antaŭ la juĝistoj, videblas, vi kuiras la saman kaĉon. Mi vetus, ke iu hontinda sekreto kuŝas en la afero, pri kiu ŝi scias, kaj ŝi silentas, nur por savi vin.

Ruprecht: Ĉu sekreto? Kia?

Veit: Kial vi pakadis, he?! Kial vi pakadis hieraŭ vespere?

Ruprecht: Ĉu miajn aĵojn?

Veit: Palton, pantalonojn, jes, kaj tolaĵon. En tuko, kiel vojaĝanto portas ĝin sur la ŝultro

Ruprecht: Ĉar mi devas iri al Utrecht! Ĉar mi devas aliĝi al la regimento! Fulmo kaj tondro! Ĉu vi kredas, ke mi...

Veit: Ĉu al Utrecht? Jes, al Utrecht! Vi hastis iri al Utrecht. Antaŭhier-aŭ vi ankoraŭ ne sciis, ĉu la kvinan aŭ la sesan vi vojaĝos.

Walter: Ĉu vi povas ion aldoni al la afero, s-ro Veit?

Veit: Altmoŝta sinjoro, mi ankoraŭ volas aserti nenion. Mi estis hejme, kiam la kruĉo rompiĝis. Kaj se konfesi la veron, ankaŭ pri aliaj cirkonstancoj mi ankoraŭ ne scias, se mi bone pezas ĉiujn faktojn, kiuj suspektigus mian filon. Tute konvinkita pri lia senkulpeco, mi venis ĉi tien post la okazinta disputo, por liberigi lin de lia nuptopromeso, kaj por repostuli la arĝentan kolĉeneton kaj la medalon, per kiuj la pas-

intan aŭtunon li honoris la knabinon okaze de ilia gefianĉiĝo. Se nun, havante blankajn harojn, mi aŭdas paroli pri eskapo kaj perfido, la afero ŝajnas al mi ne malpli multe nova kiel al vi sinjoroj. Kaj se tio estas vera, ke la diablo rompu al li la nukon!

Walter: Venigu s-inon Brigitte ĉi tien, s-ro vilaĝestro Adam!

Adam: Ĉu ĉi tiu afero ne tro lacigas vian moŝton? Ĝi tiriĝas longe. Via moŝto ankoraŭ ne rigardis la kasojn kaj la arĥivon. Kioma horo estas?

Licht: La sonorilo ĵus batis la duonon.

Adam: Ĉu antaŭ la dek-unua?

Licht: Pardonu, antaŭ la dek-dua.

Walter: Ne gravas.

Adam: Mi kredas, la tempo estas freneza aŭ vi (*rigardas la horloĝon.*) Oni ne nomu min honestulo, se... Jes, ĉu vi ordonas?

Walter: Mi havas la opinion...

Adam: Ke ni finu, ĉu? Bone...

Walter: Permesu! Mi havas la opinion, ke ni daŭrigu.

Adam: Vi havas la opinion... Bone ankaŭ tiel. Alie, kredu min, morgaŭ frue, ĝis la naŭa sonorilbato mi finus la aferon por via plena kontentiĝo.

Walter: Vi scias mian volon.

Adam: Kiel vi ordonas. S-ro notario, forsendu tuj la provosojn inviti s-inon Brigitte en la oficejon.

Walter: Kaj por ŝpari tempon, tre valoran al mi, bonvolu vi mem okupiĝi pri la afero. (*Licht for*)

Deka sceno

La antaŭaj sen Licht. Iom poste kelkaj servistinoj

Adam (*stariĝante*): Dume ni povus fari iom da paŭzo, se tio plaĉas al vi.

Walter: Hm! Ho, jes. Kion mi volis diri...

Adam: Ĉu vi permesas, ke la partioj, ĝis s-ino Brigitte alvenos...

Walter: Kio? Ĉu la partioj?

Adam: Jes, ili atendu antaŭ la pordo, se vi...

Walter (*al si*): Damnite! (*aŭdeble*) S-ro vilaĝestro Adam, ĉu vi scias, kion? Dume donu al mi glason da vino!

Adam: Tutkore volonte. He! Grete! Vi faras min feliĉa, altmoŝta sinjoro. Grete!

Servistino (*aperas*): Jen mi.

Adam: Kion vi bonvolas ordoni? Homoj, eliri! Ĉu frankan? Eliri en la antaŭĉambron! Aŭ reĵnan?

Walter: Iom da nia reĵna.

Adam: Bone. Mi vokos vin, marŝ, eksteren!

Walter: Kien?

Adam: Iru, el la sigelita, Grete! Pardonon? Nur en la galerion. Jen la ŝlosilo.

Walter: Hm! Restu!

Adam: Eksteren, marŝ! Iru, Grete! Kaj buteron, freŝfaritan, ankaŭ fromaĝon limburgan, kaj pecon el la grasa fumumita ansero pomeria.

Walter: Halt! Momenton! Ne faru tiom da ceremonioj, mi petas vin, s-ro vilaĝestro.

Adam: Malaperigu vin, en la inferon, mi ja diras! Faru, kion mi diris!

Walter: Ĉu vi forsendas la homojn, s-ro vilaĝestro?

Adam: Via moŝto deziras?

Walter: Ĉu vi...

Adam: Ili eliras, se vi permesas. Nur eksteren, ĝis s-ino Brigitte alvenos. Aŭ ĉu mi ne...

Walter: Hm, kiel vi volas. Sed ĉu tio valoras la penon? Aŭ ĉu vi opinias, ke tiel longe daŭros, ĝi ŝi estos trovita en la vilaĝo?

Adam: Hodiaŭ estas branĉaĵtago. La plimulto de la virinoj estas en la pinarbaro, por kolekti branĉaĵon. Facile povus okazi...

Ruprecht: La onklino estas hejme.

Walter: Ĉu hejme? Nu, tiam...

Ruprecht: Baldaŭ ŝi estos ĉi tie.

Walter: Ŝi baldaŭ aperos. Alportu la vinon!

Adam (*al si*): Damnite!

Walter: Daŭrigu! Tamen neniom da fritajo, mi petas vin, nur pecon da seka pano kaj salon.

Adam (*al si*): Nur du minutojn solaj kun la putino... (*aŭdeble*) Ho jes, sekan panon! Kion? Salon! Iru do!

Walter: Ja certe.

Adam: Ej, almenaŭ peceton da limburga fromaĝo. Ĝi faras la langon taŭga gustumi la vinon.

Walter: Bone. Pecon da fromaĝo, sed nenion pli.

Adam: Do iru! Kaj kovru la tablon per blanka damasko! Estas ĉio modesta sed bona. (*La servistino eliras.*) Jen la avantaĝo de ni, speco de malbonfamaj, obstinaj ĉiamfraŭloj, ke ni tion, kion aliuloj mizere kaj zorgoplene devas dividi kun edzino kaj infanoj, ni, en ĝusta horo kun ĝojo komplete ĝuas.

Walter: Kion mi volis diri? Kiel vi ricevis, s-ro vilaĝestro, vian vundon. Ĝi estas vere malbela fendo en via kapo.

Adam: Mi falis.

Walter: Vi falis. Hm! Do tiel. Kiam? Ĉu hieraŭ vespere?

Adam: Hodiaŭ, ĉe la bato de la kvina kaj duono, pardonu, matene, frue, kiam mi estis ellitiĝanta.

Walter: De kio vi falis?

Adam: De kio, altmoŝta s-ro justica inspektisto, por diri la veron, de mi mem. Mi renversigis kaj batis la kapon kontraŭ la fornĉon, ĝis nun mi ne scias, kial.

Walter: Ĉu dorsen?

Adam: Kiel dorsen?

Walter: Aŭ antaŭen? Vi havas du vundojn, unu antaŭe kaj unu mal-antaŭe.

Adam: Nu, antaŭen kaj dorsen. Grete! (*La du servistinoj enpaŝas kun vino ktp. Ili primetas la tablon kaj eliras.*)

Walter: Kiel?

Adam: Unue tiel, poste ĉi tiel. Unue kontraŭ la fornorandon, batante al mi la frunton, poste dorsen de la forno sur la plankon, kie batiĝis al mi la malantaŭo de la kapo. (*Enverŝas vinon.*) Ĉu vi bonvolas?

Walter (*prenas la glason.*) Se vi havus edzinon, s-ro vilaĝestro, mi imagus aĉajn scenojn.

Adam: Kial?

Walter: Nu, vidu, ronde-ĉirkaŭe vi estas gratita, skrapita.

Adam (*ridas*): Ne, dank' al Dio! Ili ne estas de virinaj ungoj.

Walter: Mi kredas. Jen alia avantaĝo de ĉiamfraŭloj.

Adam (*ridas plu*): Frondoj por silkovermoj, kiujn oni metis por sekigo sur la fornoangulon... Je via sano! (*Ili trinkas.*)

Walter: Kaj se tio ne sufiĉus, ĝuste hodiaŭ vi perdis ankaŭ la perukon. Ĝi nun povus kovri viajn vundojn.

Adam: Jes, jes. Falinton ĉiu atakas. Ĉu pecon el ĉi tiu grasaĵo?

Walter: Peceton. Ĉu el Limburg?

Adam: Rekte el Limburg, altmoŝta sinjoro.

Walter: Tamen, pro diablo, rakontu, kiel tio okazis!

Adam: Kio?

Walter: Ke vi perdis la perukon.

Adam: Vidu. Hieraŭ vespere mi sidas kaj legas aktojn, kaj ĉar mi formetis la okulvitrojn, mi klinas min tiel profunde super la akton, ke la kandelo neatendite ekflamigas la perukon. Mi kaptas ĝin, por forĵeti ĝin de mi, sed antaŭ ol mi malligus la nukoŝnuron, ĝi jam bruas kiel

Sodomo kaj Gomoro. Apenaŭ mi povis savi miajn restintaj tri harojn.

Walter: Damnite! Kaj la alia estas en la urbo, ĉu?.

Adam: Ĉe la perukisto. Tamen, reen al la afero.

Walter: Ne tro rapide, mi petas vin s-ro vilaĝestro Adam.

Adam: Ej, kial do? La horo kuras. Jen ankoraŭ glaso. (*Verŝas al Walter.*)

Walter: Ankaŭ tiu Lebrecht, se la bubo diris la veron, tiu havis aĉan falegon.

Adam: Ja certe. (*Trinkas.*)

Walter: Se nun la afero, kiel mi preskaŭ timas, restos nesolvita, vi ankoraŭ povos facile malkaŝi ĉi-loke la farinton pro liaj vundoj. (*Trinkas.*) Ĉu el Nierstein?

Adam: Kio?

Walter: Aŭ ĉu bona Oppenheimer'a?

Adam: Nierstein. Nu, vidu! Honorvorte, tre bone, vi kompetentas prie. Garantita, kvazaŭ mi mem alportus ĝin el Nierstein.

Walter: Mi gustumis ĝin antaŭ tri jaroj sub la premilo. (*Adam ree verŝas.*) Kiel alta estas via fenestro? Jes, la via, s-ino Marthe!

S-ino Marthe: Ĉu mia fenestro?

Walter: La fenestro de tiu kamero, jes, kie la pucelo dormas.

S-ino Marthe: La kamero estas ja nur en la teretaĝo kun kelo sub ĝi, tamen la tuta, bone elpensita arango estas tre netaŭga por saltoj. Ĉar de du futoj de la muro estas vito, kiu rampigas siajn tuberajn branĉojn tra latiso laŭlonge de la tuta muro: la fenestro estas tute ĉirkaŭplektita de ĝi. Apro mem, armita kun fortikaj dentoj povus nur pene tra rompi tie breĉon.

Adam: Kaj ankaŭ ne pendis unu sur ĝi. (*Verŝas al si.*)

Walter: Ĉu vi opinias?

Adam: Ba, kion vi diras? (*Trinkas.*)

Walter (*al Ruprecht*): Kie vi trafis la kulpinton? Ĉu sur la kapo?

Adam: Donu vian glason!

Walter: Nun lasu ĝin!

Adam: Nu, donu ĝin!

Walter: Ĝi estas ja duone plena.

Adam: Mi volas plenigi ĝin.

Walter: Vi ja aŭdis.

Adam: Nu, por rondigi la ciferon.

Walter: Mi petas vin.

Adam: Ba, kio? Laŭ la regulo de Pitagoro. (*Verŝas al li.*)

Walter (*ree al Ruprecht*): Kiomfoje vi trafis la kapon de la farinto?

Adam: Unu estas la Sinjoro, du estas la malluma ĥaoso, tri la mondo. Trio plaĉas al Dio. En la tria oni trinkas kun la gutoj la radiojn de la suno kaj kun la aliaj la stelojn de la firmamento.

Walter: Kiomfoje vi trafis la kapon de la farinto? Ej, Ruprecht, vin mi demandas.

Adam: Ĉu ni aŭdos fine? Kiomfoje vi trafis la propekan kapron? Nu, deklaru! Fulmo kaj tondro, vidu, la bubo ĉion scias, aŭ ĉu vi ĉion forgesis?

Ruprecht: Ĉu per la klinko?

Adam: Kiel mi scius?

Walter: El la fenestro, kiam vi frapis post la ulo.

Ruprecht: Dufoje, sinjoroj.

Adam: (*al si*) Fripono! Li memoras tion! (*Trinkas.*)

Walter: Dufoje. Vi povus batmortigi lin per du tiaj frapoj, ĉu vi scias?

Ruprecht: Se mi mortbatus lin, mi havus lin ĉi tie. Tio estus laŭ mia plaĉo. Li kuŝus ĉi tie etendita antaŭ mi, mortinta, mi do povus diri, tiu estis la kulpinto, sinjoroj, mi ne mensogis al vi.

Adam: Nu jes, mortinta! Mi ja kredas... Sed tiel... (*Verŝas vinon.*)

Walter: Ĉu vi ne povis rekoni lin en la mallumo?

Ruprecht: Ne, eĉ hareton lian, altmoŝta sinjoro. Kiel mi povus?

Adam: Kial vi ne streĉas la okulojn? Ni intertintigu!

Ruprecht: Ĉu la okulojn? Mi ja streĉis. La satano plensutis ilin per sablo.

Adam (*en sian barbon*): Plene per sablo, jes. Kial vi streĉas tiom la okulojn? (*aŭdeble*) Jen, altmoŝta sinjoro, nun ni tintigu je tio, kion ni ŝatas!

Walter: Je bono, vero kaj honesto, s-ro Adam! (*Ili trinkas.*)

Adam: Kaj krome kaj krone, laŭ via plaĉo. (*Enversas.*)

Walter: Vi kelkfoje iras al la domo de s-ino Marthe, ĉu, s-ro vilaĝestro Adam? Diru al mi, kiu vizitadas ŝin krom Ruprecht?

Adam: Mi, ne tro ofte, altmoŝta sinjoro, pardonu! Kiu vizitadas tie, mi ne povas diri al vi.

Walter: Kiel? Ĉu vi ne iras vidi de fojo al fojo la vidvinon de via karmemora amiko?

Adam: Ne, efektive nur tre malofte.

Walter: S-ino Marthe! Ĉu malboniĝis via rilato al vilaĝestro Adam? Li diras, ke vi jam ne eniras al ŝi por kelkaj vortoj.

S-ino Marthe: Hm, inspektista moŝto, ĉu ĝi malboniĝis? Tion mi ja ne dirus. Mi opinias, ke li ankoraŭ nomas sin bona amiko. Sed ke mi ofte vidus lin en mia domo, mi ne povus diri pri mia kuzo. Pasis jam naŭ semajnoj, ke li lastafoje enpaŝis, kaj ankaŭ tiam nur preterpase.

Walter: Kiel vi diras?

S-ino Marthe: Kion?

Walter: Ĉu vi diris naŭ semajnojn?

S-ino Marthe: Naŭ, jes, dimanĉon tio estos deka semajno. Li petis de mi semojn de kariofilujo kaj ursofelo.

Walter: Kaj ĉu dimanĉe, kiam li iras en la farmon?

S-ino Marthe: Jes, fojfoje li ĵetas rigardon tra la fenestro kaj deziras

bonan tagon al mi kaj mia filino, sed poste li iras plu sian vojon.

Walter (*al si*): Hm, ĉu mi devus ankaŭ pri li... (*Trinkas.*) Mi kredis, ke ĉar vi kelkfoje bezonas la pucelon en via mastrumo, por danko vi fojfoje vizitas ŝian patrinon.

Adam: Kiel via moŝto pensas?

Walter: Kiel? Vi diris, ke la pucelo donas al vi konsilojn, se viaj kortobirdoj malsaniĝas. Ĉu ŝi ne donis konsilojn ankaŭ hodiaŭ en ĉi tiu afero?

S-ino Marthe: Jes, certe, altmoŝta sinjoro, ŝi faras tion. Antaŭhieraŭ li sendis al ŝi malsanan numidon en la domon, kiu jam estis mortonta. Antaŭ jaro ŝi savis unu tian de pipso, kaj ankaŭ ĉi tiun ŝi resanigos per nudeloj, tamen por danko li ankoraŭ ne vizitis nin.

Walter (*konfuzite*): Verŝu al mi, s-ro vilaĝestro Adam, estu tiel bona. Verŝu tuj! Ni trinku ankoraŭfoje.

Adam: Je via servo. Vi ĝojigas min. Jen ĝi. (*Li verŝas.*)

Walter (*al s-ino Marthe*): Je via prospero! S-ro vilaĝestro Adam vizitos vin pli aŭ malpli frue.

S-ino Marthe: Ĉu vi opinias? Mi dubas. Se mi povus surtabligi al la s-ro baptano vinon el Nierstein, tian, kian vi nun trinkas, kaj kian mia karmemora edzo, la kastelservisto fojfoje same havis en sia kelo, estus alie: mi, kompatinda vidvino havas nenion en mia domo, kio allogus lin.

Walter: Des pli bone.

Dek-unua sceno

La antaŭaj. Licht, s-ino Brigitte kun peruko en la mano, la servistinoj

Licht: Ĉi tie, s-ino Brigitte, bonvolu eniri!

Walter: Ĉu ĉi tiu estas tiu sinjorino, s-ro notario Licht?

Licht: Jes, via moŝto, ĉi tiu estas s-ino Brigitte.

Walter: Do, nun ni decidu pri la afero. Forprenu ĉion, servistinoj! (*La*

servistinoj kun la glasoj ktp eliras.)

Adam (*dume*): Do, Enjo, rulu bonforma la pilolon, kiel necesas, kaj hodiaŭ vespere mi preteriros ĉe vi por plado da karasaĵo. Ĝi devas glate gliti tra la gorgo de la birdaĉo, alie ĝi povus manĝi per ĝi la morton.

Walter (*ekvidas la perukon*): Kian perukon vi portas al ni?

Licht: Pardonon, altmoŝta sinjoro?

Walter: Kian perukon portas al ni ĉi tiu sinjorino?

Licht: Hm!

Walter: Nu?

Licht: Pardonu...

Walter: Ĉu mi ekscios fine?

Licht: Se via moŝto bonvolas pridemandi la sinjorinon pere de la s-ro vilaĝestro pri tio, al kiu apartenas la peruko kaj tiel plu, mi ne dubas, ĉio klarigos.

Walter: Mi ne volas scii, al kiu ĝi apartenas. Kiel ĝi venis al la sinjorino? Kie ŝi trovis ĝin?

Licht: La sinjorino trovis ĝin sur la latiso ĉe s-ino Margarete Rull. Ĝi pendis tie implikita, simile al nesto, en la denso de la vito, tuj sub la fenestro, kie la pucelo dormas.

S-ino Marthe: Kio? Ĉu ĉe mi? Sur la latiso?

Walter (*konfidence*): S-ro vilaĝestro Adam, se vi havas ion por konfiden-
ci al mi, mi petas vin, por la respekto de la tribunalo, estu tiel bona, diru al mi!

Adam: Ĉu mi al vi?

Walter: Ĉu ne? Ĉu vi havas nenion...

Adam: Honorvorte... (*Kaptas la perukon.*)

Walter: Ĉi tiu peruko estas la via, ĉu?

Adam: Jes, sinjoroj, ĉi tiu peruko estas la mia! La sama, je Dio, kiun antaŭ semajno mi donis al la knabo, por ke li portu ĝin al majstro Mehl

en Utrecht.

Walter: Al kiu? Kion?

Licht: Ĉu al Ruprecht?

Ruprecht: Ĉu al mi?

Adam: Ĉu mi eble ne konfidis ĝin al li, al la sentaŭgulo, kiam li iris antaŭ semajno al Utrecht, por ke li portu ĝin al la frizisto, por renovigi ĝin?

Ruprecht: Ĉu vi?... Nu, jes. Li donis ĝin al mi...

Adam: Kial vi ne alportis la perukon, fripono? Kial vi ne liveris ĝin, kiel mi ordonis, al la majstro en la laborejo?

Ruprecht: Ĉu mi, kial ne? Fulmo kaj tondro! Mi liveris ĝin en la laborejon. La majstro Mehl transprenis...

Adam: Ĉu vi liveris ĝin? Kaj nun ĝi pendas sur la vitolatiso ĉe s-ino Marthe? Gardu vin, kanajlo! Vi ne eskapos! Mi flaras ĉi tie ion misan, spitan, mi ne scias, kion. Ĉu vi bonvolas permesi al mi tuj enketi prie ĉe la sinjorino?

Walter: Ĉu vi la perukon...

Adam: Altmoŝta sinjoro, kiam ĉi tiu junulo la pasintan mardon estis veturonta al Utrecht per la bovoĉaro de sia patro, li venis en mian oficejon kaj demandis: „S-ro vilaĝestro Adam, ĉu vi havas komision en la urbo?” Mia filo, mi diris al li, se vi estus tiel bona, igu rekrispigi mian perukon. Sed mi ne diris al li: iru kaj retenu ĝin ĉe vi, kamuflu vin per ĝi kaj lasu pendi ĝin sur la latiso ĉe la domo Marthe.

S-ino Brigitte: Sinjoroj, mi opinias, ke Ruprecht estas senkulpa, li ne povis esti tie. Ĉar kiam hieraŭ nokte mi eliris al la farmo, al mia kuzino, kuŝanta malsana kun sia bebo, funde de la ĝardeno mi aŭdis la knabinon subvoĉe skoldi iun. Kolero kaj timo ŝajnis rabi ŝian voĉon. “Fi, hontu, vi kanajla, kion vi faras?! Foriru! Mi vokos mian patrinon”. Kva-zaŭ hispanoj atakus. Mi vokis al ŝi tra la heĝo: Eve!, mi kriis, kio trafis vin? Kio okazas? Tiam estiĝis silento. Nu, ĉu vi respondos fine? „Kion vi volas, onklino?” Kion vi faras? mi demandis. „Kion mi farus?” Ĉu Ruprecht estas tie? „Ej, li ja, Ruprecht. Iru nur trankvile plu!” Kuiru nur

vian propran teon, mi diris al mi. Ĉi tie oni amas tiel, kiel aliaj kverelas.

S-ino Marthe: Nu kaj?

Ruprecht: Nu kaj?

Walter: Silentu! Lasu fini la sinjorinon!

S-ino Brigitte: Kiam mi venas returne el la farmo, ĉirkaŭ noktomezo, kaj iras en la tilia aleo ĝuste preter la ĝardeno de Marthe, huŝ!... figuro preterkuras min, nudkapa, kun ĉevalpiedoj, kaj post li tiriĝas fetoro, mikso el peĉo, haroj kaj sulfuro. Mi murmuris unu „Dio helpu nin”, terurite returnas min kaj vidas, Dio atestas min, sinjoroj, malaperi inter la tilioj tiun kalvon, lumantan kiel putrinta ligno.

Ruprecht: Kio? Dio en la alto!

S-ino Marthe: Ĉu vi freneziĝis, s-ino Brigitte?

Ruprecht: Ĉu vi volas diri, ke tio estis la diablo?

Licht: Haltu, silenton!

S-ino Brigitte: Je mia honorvorto. Mi scias, kion mi vidis kaj flaris.

Walter (*senpacience*): Sinjorino, mi ne volas esplori, ĉu tio estis la diablo, lin denunci oni ja ne kutimas. Se vi povas anonci ion ceteran, estas bone, sed ŝparu al ni kulpigi lin.

Licht: Permesu al ŝi, via moŝto, fini!

Walter: Malsprita popolo estas ĉi tiu!

S-ino Brigitte: Bone, kiel vi ordonas. Tamen la s-ro notario estas mia atestanto.

Walter: Kiel? Ĉu via atestanto?

Licht: En certe senco, jes.

Walter: Efektive mi ne scias...

Licht: Mi petas humile, ne ĝeni la sinjorinon en la raportado. Ke tio estis la diablo, mi ne asertas; tamen la ĉevalpiedoj kaj la kalva kapo, krome post li la fetoro, se mi ne tro eraras, estas tute versimilaj. Daŭrigu!

S-ino Brigitte: Kiam hodiaŭ kun miro mi aŭdas, kio okazis ĉe s-ino

Marthe Rull, kaj spurante pri la kruĉrompinto, kiun mi renkontis nokte ĉe la tililoj, mi esploras la lokon, kie li elsaltis, mi trovas, sinjoroj, spurojn. Ho, sed kiajn spurojn mi trovas en la neĝo? Akre desegnitajn, bone kaj precize videblajn, ordinarajn hompiedojn, kaj maldekstre, senforme, krude enpremitajn, monstre bulecajn ĉevalpiedojn.

Walter (*kolere*): Babilaĉo, freneza, kondamninda.

Veit: Tio ne eblas, virino!

S-ino Brigitte: Je mia honorvorto! Ĉe la latiso, tie, kie la salto okazis, mi vidis vastan, tretitan rondon en la neĝo, kvazaŭ porko estus tie rulĝinta; kaj spurojn de hompiedoj kaj ĉevalpiedoj dekstre kaj hompiedojn kaj ĉevalpiedojn maldekstre kaj tiel plu oblikve tra la ĝardeno eksteren al la mondo.

Adam: Damnite, ĉu la ulo estis tiel aŭdaca maski sin en maniero de diablo?

Ruprecht: Kio?! Ĉu mi?!

Licht: Silentu! Silentu!

S-ino Brigitte: Ĉasisto, kiu serĉas kaj trovas la spurojn de melo, ne triumfas tiel kiel mi. „S-ro notario Licht”, mi diras, ĉar sendita de vi, la bona sinjoro paŝas ĝuste tiam al mi, „ŝparu la kunsidon, vi ne kondamnos la kruĉorompinton, tiu restadas ne ĉi tie sed en la infero: jen liaj spuroj, laŭ kiuj li malaperis.

Walter: Ĉu vi mem konvinkiĝis pri tio?

Licht: Altmoŝta sinjoro, ŝi tutvere pravas pri la spuroj.

Walter: Ĉu pri la ĉevalpiedo?

Licht: Piedo de homo, kompreneble, sed praeter propter⁶ kiel ĉevalpiedo.

Adam: Je mia honorvorto, sinjoroj, la afero ŝajnas al mi serioza. Estas multaj kaŭstike konceptitaj verkoj, kiuj pridubas Dion, tamen, kiel mi scias, ĝis nun neniue ateisto ankoraŭ fordisputis konvinke la diablon. La

⁶ Praeter propter (latine): proksimume.

kazo, kiu nun kuŝas sur la tapiŝo, ŝajnas postuli specialan ekspertizon. Tial mi proponas, antaŭ ol vortumi konkludon, demandi la sinodon en Hago, ĉu la tribunalo estas rajtigita supozi, ke Belzebuto rompis la kruĉon.

Walter: Propono, kian mi atendis de vi. Kaj kiel vi opinias pri ĝi, s-ro notario Licht?

Licht: Viaj moŝtoj ne bezonas la sinodon por juĝi. S-ino Brigitte, finu – kun via permeso – vian ateston! El la cirkonstancoj, mi esperas, ni povos klare konstati la kazon.

S-ino Brigitte: Je tio mi diras: „S-ro notario, ni sekvu iom la spurojn, por vidi, kie la diablo forvaporigis. „Bone”, li diris, „s-ino Brigitte, bona ideo, eble ni ne bezonos iri tre malproksimen, por veni al s-ro vilaĝestro Adam”.

Walter: Nu? Kaj kion vi elĝuŝigis?

S-ino Brigitte: Unue ni trovis trans la ĝardeno, en la tilia aleo la lokon, kie la diablo preterventis min, ellasante sulfurajn vaporojn: cirklon, kian faras timigita hundo, kiam ĝi cedas flanken, se kolerblovanta kato sidas antaŭ ĝi.

Walter: Kaj kiel plu?

S-ino Brigitte: Ne tre for de tie kuŝis ĉe arbo lia memoraĵo, tia, ke mi ankaŭ nun tremas.

Walter: Ĉu memoraĵo? Kia?

S-ino Brigitte: Kia? Vi vidos...

Adam (al si): Damnite, mia stomako.

Licht: Preterlasu tion, mi petas vin, s-ino Brigitte, preterlasu!

Walter: Mi volas scii, kien kondukis vin la spuroj.

S-ino Brigitte: Kien? Je mia fido, la vojo kondukis, kiel s-ro notario Licht diris, rekte al vi.

Walter: Ĉu al ni? Ĉu ĉi tien?

S-ino Brigitte: De la tilia aleo, jes, direkte al la vilaĝestra herbejo, laŭ la

Karpo-lago sur la pado tra la tombejo, poste ĉi tien, kiel mi diris, rekte al s-ro vilaĝestro Adam.

Walter: Ĉu al s-ro vilaĝestro Adam?

Adam: Ĉu ĉi tien al mi?

S-ino Brigitte: Al vi, jes.

Ruprecht: Ĉu diablo loĝas en la juĝejo?

S-ino Brigitte: Mi ne scias, ĉu diablo loĝas en ĉi tiu domo, tamen ne estu honesta mia nomo, se ne veras, ke la spuroj kondukas ĝis ĉi tie: malantaŭen ĝis la sojlo.

Adam: Ĉu li eble ĉi tie trapasis?

S-ino Brigitte: Jes, li povis ĉi tie trapasi. La spuroj antaŭe...

Walter: Ĉu estis spuroj antaŭ la domo?

Licht: Spuroj antaŭe, pardonu via moŝto, ne estis.

S-ino Brigitte: Jes, antaŭe la nego estis distretita.

Adam: Distretita... trapasinta! Mi vetus per la kapo, la fripono aĉe hontigis ĉi tie la leĝon. Ne estu honesta mia nomo, se io ne stinkas en la arĥivo. Mi ne mirus, se miajn kalkulojn ni trovus dise-mise renvers-itaj, disĵetitaj. Je mia kapo, mi ne donus garantion.

Walter: Mi same ne. (*al si*) Hm! Mi ne scias, ĉu estis la dekstra aŭ la maldekstra. Ĉiukaze unu el la piedoj. (*aŭdeble*) S-ro vilaĝestro, ĉu vi bonvolus doni al mi vian tabakujon?

Adam: Ĉu la tabakujon?

Walter: La tabakujon, donu al mi!

Adam (*al Licht*): Portu ĝin al la inspektista moŝto!

Walter: Kial ceremonii? Nur kelkaj paŝoj.

Adam: Jam aranĝite. Donu ĝin al lia moŝto!

Walter: Mi volonte dirus ion en vian orelon.

Adam: Eble poste ni havos okazon...

Walter: Bone ankaŭ tiel. (*Post kiam Licht residiĝis.*) Sinjoroj, diru al mi, ĉu estas en la vilaĝo iu kun torditaj piedoj?

Licht: Hm! Ja certe estas ĉi tie en Huisum...

Walter: Ĉu? Kiu?

Licht: Via moŝto bonvolu demandi la s-ron vilaĝestron.

Walter: Ĉu s-ron vilaĝestron Adam?

Adam: Mi scias pri neniu. Mi jam oficas la dekan jaron en Huisum; kiom mi scias, ĉiuj havas normalan kreskon.

Walter (*al Licht*): Nu, pri kiu vi pensas?

S-ino Marthe: Lasu ekstere viajn piedojn! Kial vi kaŝas ilin kvazaŭ en embaraso sub la tablo, oni venus al la penso, ke postlasis vi tiujn spurojn.

Walter: Kiu? Ĉu s-ro vilaĝestro Adam?

Adam: Ĉu mi? Ĉu la spurojn? Ĉu mi estus diablo? Ĉu ĉi tiu estas ĉevalpiedo? (*Montras sian maldekstran piedon.*)

Walter: Je mia honorvorto, la piedo estas bona. (*flustre*) Nun finu la kunsidon!

Adam: Se la diablo havus tiajn piedojn, li povus iri danci al baloj.

S-ino Marthe: Ankaŭ mi diras la samon. Se la s-ro vilaĝestro estus...

Adam: Ba, ĉu mi?!

Walter: Faru tuj finon, mi ja diras.

S-ino Brigitte: La sola, kio vekas skrupulon, estimataj sinjoroj, ŝajnas al mi, estas ĉi tiu festa ornamaĵo!

Adam: Kia festa...

S-ino Brigitte: Jen ĉi tiu peruko! Kiu vidis ajn-iam diablon en tia kapornamo? Vera konstruaĵo, kun turoj, pufiĝanta de sebo, kiel tiu de kapitula dekano en predikseĝo.

Adam: Ni konjektas ĉi-tere nur nebule, kia estas la modo en la infero, s-ino Brigitte! Oni diras, la diablo kutime surhavas sian propran hararon. Sed ĉi tie, sur la tero, mi estas konvinkita, li metas perukon, por

miksiĝi inter la eminentulojn.

Walter: Mizerulo! Vi meritis esti hontige forpelita antaŭ ĉiuj de la juĝ-ista seĝo! Kio sola protektas vin, estas nur la aŭtoritato de la tribunalo. Fermu la kunsidon!

Adam: Mi esperas, ke...

Walter: Nun esperu nenion. Provu elturniĝi el la afero!

Adam: Ĉu vi kredas, ke mi, la vilaĝestro perdis la perukon hieraŭ sur la vito?

Walter: Dio gardu min! La via jam konsumiĝis en fajro kiel Sodomo kaj Gomoro.

Licht: Ho ne, pardonu, altmoŝta sinjoro! La katino akuŝis en ĝi hieraŭ.

Adam: Sinjoroj, se la ŝajno min kondamnas, vi ne tro hastu, mi petas vin. Temas pri mia honoro aŭ infamio. Dum la pucelo silentas, mi ne komprenas, kun kia rajto vi kulpigas min. Ĉi tie, en Huisum sidas mi en la juĝista seĝo, kaj kiu asertas, ke la peruko sur la tablo estas la mia, tiun mi asignos antaŭ la kortumon en Utrecht.

Licht: Hm! Sed la peruko ja laŭas vian kapon, kvazaŭ kreskinta sur via verto. (*Metas ĝin sur lian kapon.*)

Adam: Kalumnio!

Licht: Ĉu ne?

Adam: Ĝi estas vasta kiel mantelo ĉe ŝultroj, multe pli kiel peruko sur la kapo. (*Rigardas sin en la spegulo.*)

Ruprecht: Ha, ulo glita kiel fulmo!

Walter: Silentu, he!

S-ino Marthe: Ha, vilaĝestro, trifoje malbenita!

Walter: Ankoraŭfoje mi diras, ĉu vi volas tuj fermi la aferon?

Adam: Jes, ĉu vi ordonas?

Ruprecht (*al Eve*): Eve, diru, ĉu tio estis li?

Walter: Kion aŭdacas la senhonta?!

Veit: Silentu, mi diras.

Adam: Gardu vin, bestio, mi instruos al vi la morojn!

Ruprecht: Damnita ĉevalpiedo!

Walter: He, provoso, ĉi tien!

Veit: Fermu la bekon, se mi diras!

Ruprecht: Gardu vin! Hodiaŭ mi atingos vin. Hodiaŭ vi ne ŝutos sablon al mi en la okulojn!

Walter: Ĉu vi ne havas tiom da prudento, s-ro vilaĝestro, por...

Adam: Jes, se via moŝto permesas, nun mi eldiras la verdikton.

Walter: Bone, faru. Ĝi estu eldirita.

Adam: La afero estas nun klarigita, la farinto estas la fripono tie, Ruprecht.

Walter: Bone ankaŭ tiel. Plu!

Adam: Mi kondamnas lin stari publike en hontiga kolfero, kaj ĉar li kondukis malrespekte al sia vilaĝestro, mi ĵetos lin malantaŭ kradon. Kiel longe, mi poste decidos.

Eve: Ĉu Ruprecht?

Ruprecht: Ĉu min, malantaŭ kradon?!

Eve: Ĉu en hontiga fero?

Walter: Superfluas zorgi, infanoj. Ĉu vi pretas?

Adam: Koncerne la kruĉon, li povas pagi aŭ ne.

Walter: Do bone. La kunsido estas fermita. Kaj Ruprecht apelacias al la kortumo en Utrecht.

Eve: Ĉu li devas apelacii en Utrecht?

Ruprecht: Kio? Ĉu mi?!

Walter: Mil diabloj, jes! Kaj dume...

Eve: Kaj dume?

Ruprecht: Ĉu mi iru malantaŭ kradon?

Eve: Ĉu meti lian kolon en feron? Ĉu vi estas juĝistoj? Li, la senhonta, kiu tie sidas, estas mem la farinto.

Walter: Damnite, silentu! Ĉu vi aŭdas? Ĝis tiam eĉ unu haro de lia kapo ne pereos.

Eve: Kuraĝon, Ruprecht! La vilaĝestro Adam rompis la kruĉon!

Ruprecht: Ha, haltu por momento!

S-ino Marthe: Ĉu li?

S-ino Brigitte: Ĉu ĉi tiu?

Eve: Tiu ja! Kuraĝon, Ruprecht! Li estis hieraŭ ĉe via Eve! Ek, kaptu lin! Ne ŝparu lin, nur kiel al vi plaĉas!

Walter (*stariĝas*): Haltu ĉiuj! Kiu kulpos ĉi tie kontraŭ la ordo...

Eve: Estas jam egale. La fero estas meritita, ek, Ruprecht! Iru, elĵetu lin el la juĝista seĝo!

Adam: Pardonu, sinjoroj! (*Forkuras.*)

Eve: Jen tie, ek do!

Ruprecht: Retenu lin!

Eve: Rapide!

Adam: Kio?

Ruprecht: La lama diablo!

Eve: Ĉu vi kaptis lin?

Ruprecht: Fulmo kaj tondro! Nur lian mantelon!

Walter: Rapide, voku la provoson!

Ruprecht (*batas la mantelon*): Rato, jen al vi! Rato, ankoraŭ unu! Kaj ankoraŭ pli! Manke de dorso en ĝi.

Walter: Ej, needukita homo! Oni faru ĉi tie ordon! Se vi ne mildiĝos tuj, la kolfero povos plenumiĝi je vi.

Veit: Trankviligu, sovaĝa bubo!

Dek-dua sceno

La antaŭaj sen Adam. Ĉiuj iras sur la rivalton.

Ruprecht: Ej, Enjo! Kiel hontinde mi ofendis vin hodiaŭ! Dio en la alto, kaj kiom hieraŭ! Ho, vi, mia ora trezoro, fianĉino laŭ mia koro! Ĉu vi povos iam pardoni min en la vivo?

Eve (*ĵetas sin antaŭ la piedojn de la justica inspektisto*): Sinjoro, se vi nun ne helpas, ni estas perditaj!

Walter: Perditaj? Kial do?

Ruprecht: Dio mia, kio okazis?

Eve: Savu Ruprecht de la konskripcio! Ĉar ĉi tiu konskripcio, vilaĝestro Adam malkaŝis al mi konfidence, signifas Orient-Hindion, kaj de tie, vi scias, el tri viroj revenas nur unu!

Walter: Kio, ĉu al Orient-Hindio?! Ĉu via menso foriris promeni?

Eve: Al Bantam, altmoŝta sinkoro, ne neu tion! Jen la letero, la malpublika, sekreta instrukcio, koncernanta la tutlandan milicon, antaŭ nelonge eldonis ĝin la registaro. Kiel vi vidas, mi estas informita pri ĉio.

Walter (*prenas kaj legas la leteron*): Ha, senekzempla, malica trompo! La letero estas ja falsa!

Eve: Ĉu falsa?

Walter: Falsa, tiel vere, kiel mi vivas. Diru vi mem, notario Licht, ĉu ĉi tiu estas la ordono, kiu estis antaŭ nelonge eldonita en Utrecht?

Licht: Ĉu ordono? Ho, kia fripono! Peco de papero, kiun li plenskribis propramane. La varbitaj trupoj estas destinitaj por enlanda servo, ne niu intencas sendi ilin al Orient-Hindio!

Eve: Ĉu ne, neniam, sinjoroj?

Walter: Je mia honorvorto! Kaj por pruvi miajn vortojn, se estas tiel, kiel vi diris, mi elaĉetos Ruprecht!

Eve: Ho, ĉielo! Kiom la maliculo trompis min! Kaj ĝuste per ĉi tiu terura zorgo li turmentis mian koron, kaj venis dum noktotempo, por trudi al mi atestilon; falsa atestilo pri malsano, li klarigis kaj certigis al

mi, povus lin liberigi de ĉiu militservo, kaj li glitis ruze en mian ĉamb-
ron, por plenigi ĝin, postulante de mi page ion tiel hontindan, kion
knabina buŝo ne kuraĝas eldiri.

S-ino Brigitte: Ha, kia kanajlo, hontinda trompulo!

Ruprecht: Lasu tamen la ĉevalpiedon, mia dolĉa knabino! Vidu, se ĉe-
valo disbatus ĉe vi la kruĉon, mi egale ĵaluzus kiel nun. (*Ili kisas sin.*)

Veit: Ankaŭ mi same opinias! Kisu kaj dorlotu kaj amu unu la alian, kaj
en Pentekosto, se vi volas, ni povos fari la nupton!

Licht (*ĉe la fenestro*): Rigardu, homoj, kiel vilaĝestro Adam tragalopas
la vintran plugokampon de rando al rando, kvazaŭ eskapante rad-
umon aŭ pendumon!

Walter: Kio? Ĉu tiu estas vilaĝestro Adam?

Licht: Ja vere!

Pluraj: Nun li venas sur la vojon. Rigardu, rigardu! Kiel la peruko ver-
gas lian dorson!

Walter: Rapide, s-ro notario, ek, rekonduku lin, por ke la rimedo ne
fariĝu pli malbona ol la malbono mem. Kvankam li estas suspendita en
sia ofico, ĝis plua dispono mi rajtigas vin administri la komunumon. Kaj
se la kaso estas en ordo, kiel mi esperas, mi ne volas trudi lin al dizert-
ado. Do ek, faru al mi la komplezon, rekonduku lin! (*Licht for*)

Lasta sceno

La antaŭaj sen Licht

S-ino Marthe: Bonvolu diri al mi, altestimata moŝto, kie mi trovas en Utrecht la sidejon de la registaro?


Walter: Kial, s-ino Marthe?

S-ino Marthe (*emocie*): Hm! Kial? Mi ne scias... Ĉu oni ne devus doni justecon al la kruĉo?

Walter: Pardonu min! Ja nepre. Ĉe la granda foirplaco estas marde kaj vendrede kunsidoj.

S-ino Marthe: Mi estos tie post semajno. (*ĉiuj for*)

KURTENO



Heinrich von Kleist (1777-1811): devenas el malnova nobela familio pomerania. Laŭ la familia tradicio li elektis la armean servon, sed laboris ankaŭ en la ŝtata administracio, studis filozofion, interesiĝis pri natursciencoj, redaktis gazetojn, sed fine fariĝis unu el la plej grandaj dramverkistoj de la germanaj klasikismo kaj frua romantikismo. Suferante pro depresio kaj financaj malfacilaĵoj, li pafmortigis sin kune kun sia malsana amikino Henriette Vogel.

Lia komedio *La rompita kruĉo* prezentas nederlandan vilaĝon de la 17a jc., kie rompita kruĉo elvokas diversajn konfliktojn inter la vilaĝanoj kaj geamanta paro. La enketado kun multaj turnoj fare de la vilaĝestro kaj justica inspektisto donas surprizan rezulton.

Lia novelo *Mihaelo Kohlhaas* aperis ankaŭ en Esperanto.

* * *

S-ino Brigitte: *Kiam mi venas returne el la farmo, ĉirkaŭ noktomezo, kaj iras en la tilia aleo ĝuste preter la ĝardeno de Marthe, huŝ!... figuro preterkuras min, nudkapa, kun ĉevalpiedoj, kaj post li tiriĝas fetoro, mikso el peĉo, haroj kaj sulfuro. Mi murmuris unu "Dio helpu min", terurite returnas min kaj vidas, je mia honorvorto, sinjoroj, malaperi tiun kalvon lumante inter la tilioj kiel putrinta ligno.*

Ruprecht: *Kio? Dio en la alto!*

S-ino Marthe: *Ĉu vi freneziĝis, s-ino Brigitte?*

Ruprecht: *Ĉu vi volas diri, ke tio estis la diablo?*

Licht: *Haltu, silenton!*

S-ino Brigitte: *Je mia honorvorto. Mi scias, kion mi vidis kaj flaris.*

Walter (senpacience): *Sinjinino, mi ne volas esplori, ĉu tio estis la diablo, lin denunci oni ja ne kutimas. Se vi povas anonci ion ceteran, estas bone, sed ŝparu al ni kulpigi lin.*